MEGYEI KÖNYVTÁR
SALGÓTARJÁN

HUNGARA VIVO

1
1973
8,— Ft



Balatonederics

AGIP

ĉiutempe, ĉiuloke
benzino AGIP
kaj
motoroleo AGIP

Balatonvilágos

ÁFOR
BENZIN-OLAJ

HUNGARA VIVO

Kvaronjara revuo
de Hungara Esperanto-Asocio
Budapest VIII. Kenyérmező utca 6.
XIII-a jaro, 1973. 1-a numero

Numero pri Sándor Petőfi

ENHAVO

István Simon: La ekzemplo de Petőfi, *Tr. VK.* 1
Sándor Petőfi: Poemoj, *tr. K. Kalocsay* 3
El taglibro de Petőfi, *tr. Krisztina Nyitray* 4
Sándor Petőfi: Al arboj flustras, *tr. K. Kalocsay* 4
M. Fejes: Petőfi eksterlande . . 5
Henri Vatré: Libero kaj amo de Petőfi 6
P. Balkányi: La grafo de Petőfi 7
Tibor Déry: Remi-Romeo, *tr. Lajos Tárkony* 10
J. Szekeres: Panoramo 12
I. Bácskai: La Metro de Budapeŝto 14
Gabriella Ősz: Amikaj kontaktoj inter la teatroj 16
Zsuzsa D. Fehér: Lajos Szalay . 17
Lajos Szalay: Du desegnoj . . . 17
A. Pechan: Imre Ungar (1909—1972) 18
L. Kökény: Seminario ĉe la Balatono 18
Szilárd Bálint: Mesaĝo al Vjetnamio 19
Gasta paĝo: Eli Urbanova . . . 19
Lajos Tárkony: Revuo de revuoj 20
Facilaj legaĵoj . . . . . 22—23
Lajos Lesznai: Internacia famo de hungaraj gramafon-diskoj . 23
K. Kalocsay: Memore al Tomas Pumpr 24
Beograd invitas vin 24
E. Fenyvesy: Religieco en Hungarlando 25
Ekzameno sen risko 25
E. Farkas: La unua Zamenhofletero al Hungarujo 28
my: Lilli Promet: Kuŝanta tigro 28
Forumo — Leterkesto — Korespondi deziras 30
FERI: Krucvortenigmo 31
Árpád Máthé: Por pura aero . . 32

Sur la kovrilpaĝo: Sándor Petőfi (dagerotipio)

István Simon:

LA EKZEMPLO DE PETŐFI

Nur al la legendo de mirakloj estas komparebla la disvastiĝo de lia nomo-renomo. Preskaŭ ĉio de li dirita plenumiĝis kun fidindeco nebreĉetita:

Patrin', la sonĝoj ne mensogas:
eĉ se min kovros ĉerk-kovril',
eterne vivos glora nomo,
poeta nom' de via fil'

— ni memoras ĉi tiujn fantome praviĝintajn versojn el unu de liaj fruaj poemoj. El ili sonoras ankaŭ la decidiĝo de juna homo staranta komence de sia vivovojo: junula decidiĝo originanta el lia profunda sento de alvokiĝo, ke li konscie travivos sian vivon. Kaj ni scias jam, ke tiu profetaĵo estas pli ol ia romantika revo: ĝi estas la plenumiĝinta vizio de geniulo.

Lian vojon ĉiam volonte oni komparis al tiu de kometo. Vere, ĝi estis destinita kiel tre mallonga (li naskiĝis la 1-an de januaro 1823, falis en la batalo ĉe Segesvár la 31-an de julio 1849), kaj ĝuste tial estas tiom blindige brila lia potenca flamovosto, videbla kiu scias kiel longe ankoraŭ en la futuro. Li estis mondskale la plej individua kaj perfekta resumanto de la revoluciaj kaj respublikaj-demokratiaj bataloj de sia jarcento. Ni aldonas ankoraŭ, ke en la bolanta periodo de la elformiĝo de l'naciaj ŝtatoj, en la luktado por nia nacia sendependo, li estis samtempe la plej kuraĝa kaj konsekvenca politikisto. Kiel lirikisto, li levis sur la plej altan nivelon la grandan tendencon de la tiama Eŭropa poezio: la lirikan realismon. Kompreneble do, ke lian signifon kaj sorĉan personecon oni provis alirebligi per kosmaj komparoj. Lia signifo estos por ni eĉ pli valora, se ni rigardos lian vivoverkon ne kiel miraklon de hazardo, sed kiel rezulton de jarcenta prepar-laboro de popolo, kiel rezulton de tiu batalado, kiun li mem, kiel fidela popolido, volis triumfigi.

Ekde komenco de la 19-a jarcento — kaj ni povas aldoni ankaŭ la du lastajn jardekojn de la 18-a — nia literaturo kvazaŭ konscie kaj regule konstruis la vojon al la nacia sendependeco kaj pleba-demokratia revolucio. Kazinczy kaj liaj adeptoj orientiĝis al Eŭropo, aliparte Csokonai Vitéz, la plej granda poeto de la jarcento-fino, sub la efiko de la klerismaj ideoj, trafis al la trasento de la popolismo kaj levis ĉi tiun samtempe sur altan lirikan nivelon, — ĉio ĉi estis bona samritma marŝpaŝado de la hungara klerismo kun la tiamaj progresivaj movadoj politikaj. La romantikistoj per la flirtigo de la pasea gloro, Kölcsey kaj Vörösmarty per grandaj historiaj vizioj vekadis la nacian konscion kaj iome-duone ĝin ankaŭ kreis. La t.n. reform-generacio, kun la ega pezo de ĉi tiu duobla heredaĵo sur la ŝultroj, kaj sentante samtempe ankaŭ la urĝadon de la tempo, kvazaŭ brulis de la taskoj.

Kiam Petőfi elpaŝis, jam pretendo tutnacia estis eldevigi la nacian sendependecon, liberiĝi el sub la Habsburga premo preskaŭ tri-kaj-duon-jarcenta. La interna socia transordiĝo, la transformado de la feŭda Hungarlando, siavice, fariĝis intereso de la granda plimulto de l' nacio.

La perfektaj poemoj de la lasta triono de lia poezio ĝuste tial estas tiom brilaj pruvoj pri klarvido kaj celkonscio de revoluciulo, ĉar ili povus kompensi eĉ la plej detalajn faktopriskribojn de la historiolibroj pri la hungara liber-milito. Tiuj poemoj ŝanĝis la nacian konscion de la hungara popolo preskaŭ en ties fundamentoj. Per liaj poemoj la signifo de la nacia kaj ĝenerala socia progreso ensorbiĝis, laŭ sia plej moderna senco, en la publikan konscion. Li konceptis konsekvence kaj ĝisfine la esencon de tiuj politikaj bataloj,

Julia Szendrey, edzino de Petőfi

Desegnaĵo de Petőfi pri generalo Bem



Desegnaĵo de Petőfi pri Arany

kiuj ekiris el la reformpolitiko de Széchenyi, dislarĝiĝis en la revolucio kun Kossuth jam ĝis la radikala transformado de la feŭda Hungarlando kaj — aliparte — ĝis la realigo de la respublikaj ideoj.

Pripensante ĉion ĉi, apenaŭ ni trovos miriga, ke lia aktualeco ne perdiĝis post lia morto eĉ dum cent jaroj. La progresivaj politikaj movadoj, la ree kaj ree ekflagrantaj novaj moviĝadoj devis plu kaj plu fiksi liajn ideojn sur sian standardon. Eĉ tiam tiuj ideoj estis ja ankoraŭ realigotaj. Kaj, rigarde al la futuro, Petőfi sentis plej bone la kapablon, forton kaj eternan povon de la popolo transformi la mondon, ĝian ekskluzivan rolon en ĉiu socia renoviĝo. Jen kial lia vivoverko ne povis eksmodiĝi, jen kial ĝi estas ĝis hodiaŭ kaj restos ankoraŭ longe aktuala.

Kaj nin fascinas ne nur lia tiel nomata aktuala temomondo, sed ankaŭ lia freŝa originaleco torente ondanta el lia nekadukiĝanta poezia lingvo kaj ankaŭ lia freŝa bildo-riĉeco. Eĉ el la plej sensignifaj momentoj de la mondo li scias elmontri la ĝeneralan homan veron kaj ne konas temon nepoezian, se ĉi tiu necesas por ekspliko de homa aŭ socia vero, — jen kiel li donas ekzemplon ankaŭ pri poeta originaleco. Kaj iel li konceptas per tio ankaŭ la kriterion de la aŭtentikeco. Li nome aŭtentikigas ankaŭ sian grandan idean dir-enhavon per sia kuraĝa realismo, ĉiam preciza eĉ en bagatelaĵoj, kaj per la ĉiea konsekvenceco de la individueco. Ankaŭ tiam, se li priskribas la precizan topografion de la kaduka ĉardo „Hundgrato". La logikon de lia genieco tiamaniere ni sentas aŭtentika ankaŭ tiam, kiam ni legas, kion ni taksas hodiaŭ jam banala diro, sed kiu siatempe estis unuafoje eldirita granda penso: *„Se iam ĉiu sklav-popol' ribelos kun jugrompa vol'"*. Nome, nur tiam povas estiĝi mond-libero, se la aparte liberaj popoloj povos unuiĝi.

Pro ĉi tiu strebado elĉerpi la plenan tuton ni povas nomi la vivoverkon de Petőfi la plej universala poeta verkaro de nia literaturo. Lia poezio donis ĝis nun, en kiu ajn rilato ni ĝin rigardas, la plej kompletan bildon pri la hungararo. Ne hazarde, ke la eksterlando, se ĝi volis nin vidi reale, turnis sin al Petőfi: li diris ja al ĝi plej multe pri ni. Mirinde, kiel lia revolucia liriko ĉirkaŭfermis en si kvazaŭ la ekziston, sed ĉiuokaze la tuton de la siatempe socia ekzisto. El la grandaj problemoj de la 19-a jarcento eble nur la problemon de la naciaj minoritatoj li ne rimarkis. Sed, ĉar ankaŭ li mem parolis en la nomo de tiutempe subpremita nacio, li eĉ ne povis trasenti tiun komplekse. Tamen, post duona jarcento, Endre Ady, ekbatalinte sub lia standardo, ne hazarde vidis plej klare en tiu problemo ĉe-Danuba. Ankaŭ tio sekvis rekte el la idea heredaĵo de Petőfi.

La tiel nomataj fundamentaj veroj de la ekzisto, kiuj esprimiĝas en liaj poemoj, neniam estas sendependaj de la homaj kolektivoj ilin serĉantaj aŭ ĝuste estigantaj, t.e. de la socio, nacio, aŭ la tuto de la homaro. Kiun ajn ni ellevas el tiuj nocioj — socio, nacio, homaro — la diro-sumo elaŭdebla el po unu lia poemo sentigas al ni, ke la plilaborita temo venis sur sian plumpinton ekskluzive en la intereso de ia vero esprimebla per ĝi plej bone kaj precize, kaj servanta konkrete iun el tiuj nocioj. Tiu poezia temo kelkfoje ligiĝas al loko kaj tempo, ŝajne, oni povus diri, al bagatela aktualaĵo, sed ĝi estas ĉiam ellaborita tiamaniere, ke plej bone ĝi servu la homan intereson. Eble ankaŭ tiamaniere, ke plej utile ĝi servu ankaŭ nian intereson, tiun de la leganto. Kaj ke ĝi estu plej proksima al nia vivosento.

Ne estas malfacile, tra la vivoverko de Petőfi, proksimiĝi ankaŭ tiaflanke al la sekreto de la eksterlanda interesiĝo pri nia popolo. Jam en la lernejo ni ellernis pri la esenco de lia poezio, ke unu el ties gravaj kriterioj estas unuavice la konkreteco de liaj poemoj, ilia ligiteco al loko. Petőfi malkovris por ni la hungaran Ebenon — ni sciiĝis —, eĉ estis li, kiu unuafoje konsciigis tra pleba vivosento la veran patrujon. Ĉi tiuj, kompreneble, jam estas verajoj konataj tiel ĝenerale, ke ili — oni povus kredi kelkfoje — eĉ ne



Naskiĝdomo de Petőfi

estas indaj je vorto. Tamen, nur helpe de ĉi tiuj ni povas klarigi la universalecon de Petőfi tra lia neĉesema eksterlanda popularecо.

La interligojn de lia universaleco kaj enlanda efiko, simile kiel la plej memkompreneblajn aferojn, ekzemple la interligon de oksigeno kaj spirado, kelkfoje oni povas prilumigi plej malfacile. Tamen, ni bone scias, kiom, ekde cent dudek tri jaroj, de epoko al epoko, difinis ankaŭ la karakteron de nia poezio la heredaĵo de Petőfi, la tuta formo-mondo de lia liriko, kiel oni kutimas resumi ĉiujn karakterizajn kriteriojn de memesprimo de granda individuo. En natura maniero, ĝi ĉiam fariĝis kontrasto, ĉar envere nur al ĝi oni povis rilatigi, kiom la liriko de unu epoko formoviĝis ien kompare kun la liriko de epoko alia.

La platiĝinta epigon-liriko de la jarcenta fino apelaciis je Petőfi, sed ĝi senmaskiĝis ĝuste per tio, ke ĉiu rimarkis, kiom en ĝi mankas la animo, la originaleco de la majstro. Kiam la jarcentkomenca literatura revolucio — unuavice per Endre Ady — denove kreis kontakton kun la revoluciulo Petőfi, tio certigis la naturan kontinuecon de la plej progresiva hungara spirito, sen tio tamen, ke ankaŭ la t.n. ekstere videblan formon ĝi rigardus deviga heredaĵo; male, ĝuste la forma kaj lingva diferenco disde Petőfi signis la esence novan. Kaj se ni volus sensigi per io la diferencon inter la poaj poeziaj klopodoj en la tempo inter la du mondmilitoj, ree la spirito de la Petőfia vivoverko estus taŭga por tio, kiel ia elprovita kaj aŭtentigita baz-unuo. Kiam la trion Petőfi—Ady—Attila József ni mencias kiel pilierojn de nia literaturo, tiam la kontinueco de la Petőfi-poezio vivas en nia konscio. Tial pri ĝia efiko kaj pri ties fekundiga ĉeesto ankaŭ en nia pli nova poezio ni konsciiĝis siatempe preskaŭ tiel memkompreneble, kiel pri la natura interdependo de la oksigeno kaj la spirado . . .

Petőfi jam tiutempe metis en la akson de sia poezio logike, tra kompreno kaj travivo de la konkretaj naciaj problemoj, la ideojn de la mond-libereco. Tial li estos eterna instiganto de la vere novaj poetaj strebadoj de iuj tempoj. Kiel ajn, nome, ni rigardas la eblojn de la progreso — en literatura senco —, ties ĉefa celo estos ĉiam la homo, t.e. la homa liber-idealo. Kaj nur el la ekscita realaĵo de la popolo, nur desegnante la evoluon de ties spirita mondo, nia literaturo sukcesos ree triumfigi la ĝeneralan homecon, la novan socialisman vivosenton. Ĉar nur ĉi tio nin povas gardi kontraŭ provincanismo, imita duagradeco; nur ĉi tio povas certigi ankaŭ la originalecon de nia nova poezio.

Kun varma danko ni rigardas la vivoverkon de Petőfi je la 150-a datreveno de lia naskiĝo ankaŭ pro tiu admirinda ekzemplo, ke jen, ankaŭ malgranda popolo povas doni pere de sia granda filo trezoron al la universala homaro.

Ĉar ankoraŭ longe resonos liajn belajn kantojn *„la montpintoj de la tempo, la jarcentoj"*.

Tr. VK

POEMOJ DE SÁNDOR PETŐFI

HUNGARLANDO

Nu, ja vi ne naskiĝis kuiristo,
patrujo mia, dolĉa Hungarland',
vi forbruligas parte la rostaĵon
kaj lasas kruda ĉe l'alia rand'.

Dum unuflanke sufokiĝas viaj
loĝantoj gajaj pro la troabund',
jen, aliflanke multaj viaj filoj
venas pro malsatmort' al tomba
fund'.

KIEL STRANGE SONĜIS MI . . .

Kiel strange sonĝis mi ĉi-nokte;
mian koron pikis vi, trezor',
tuta sango fluis el la kor', sed
ĉiu guto iĝis ruĝa flor'.

Kio estas la signif'? Nenio,
krom ke l' amo estas tia sent':
morte ĝi turmentas nian koron,
tamen, dolĉa estas ĉi turment'.

ALAŬDON AŬDAS MI . . .

Alaŭdon aŭdas mi denove . . .
Delonge mi forgesis pri l'
birdeto kara. Ho, printemp-
heroldo,
sonoru plu per gaja tril'.

Dio, min kiel dolĉe tuŝas
ĉi sonoj post batala bru'!
Kiel se brulan vundon banas
monta
torento per la freŝa flu'.

Ho, kantu, trilu, kara birdo!
Min memorigas ĉi kantet',
ke ne nur murda il', soldat' mi
estas,
sed ankaŭ homo kaj poet'.

Pri amo kaj pri poezio
min memorigas via son',
kaj, kion donis al mi ĉi diinoj
kaj donos, pri la multa bon'.

De l'son' refloras du rozujoj:
l' espero kaj la rememor',
kaj ili klinas siajn belajn branĉojn
al mia sorĉebria kor'.

Kaj sonĝas mi en tiel dolĉa,
en tiel rava revo-lul'
pri vi, mia anĝel' fidela, kiun
mi amas kun fidela brul'.

Beato de animo mia,
vi, kiun al mi donis Di'
por montri, ke ne supre la ĉielo
sed sur la tero, tie ĉi.

Ho kantu, birdo, floroj kreskas
laŭ via dolĉa voĉo . . . Jen,
kiel dezerta estis mia koro,
kaj nun ĝi estas florĝarden'.

Tr. K. Kalocsay

EL TAGLIBRO DE PETŐFI

(Fragmentoj)

Peŝt, 17-an de marto 1948.

Ekde jaroj estas mia preskaŭ ekskluziva legaĵo, mia matena kaj vespera preĝo, mia ĉiutaga pano la historio de la francaj revolucioj, ĉi-tiu nova evangelio de la mondo, en kiu la dua Mesio de la homaro, la libereco anoncas sian mesaĝon. Ĉiujn ĝiajn vortojn, ĉiujn literojn mi engravuris en mian koron kaj tie interne la mortaj literoj reviviĝis kaj por la reviviĝontaj fariĝis malvasta la loko kaj ili furiozis, deliris en mi.

En la mezon de la vulkano mi devus trempi mian plumon, por ke mi priskribu miajn tagojn, la turmentojn de miaj tagoj.

Tiel mi atendis la estontecon, mi atendis tiun momenton, en kiu miaj ideoj kaj sentimentoj pri la libereco, ĉi tiuj damnitaj animoj de mia koro povos forlasi la karceron, la lokon de sia torturo... mi atendis tiun momenton, ne nur esperis, sed certe kredis, ke ĝi alvenos. Tion atestas miaj poemoj, kiujn mi verkis ekde pli ol unu jaro. Ne laŭ rezonado, sed el tiu profeta inspiro, aŭ se plaĉas, oni nomu ĝin instinkto, kiu vivas en la poeto, klare mi vidis, kiel Eŭropo ĉiutage proksimiĝas al grandioza, perforta skuiĝo. Tion mi plurfoje priskribis, eĉ al pluraj mi rakontis. Neniu kredis mian aŭguron, multaj min priridis pro tio, ĝenerale oni nomis min revema naivegulo, sed tamen senĉese vivis en mi tiu kredo, kaj mi sentis min kiel la bestoj antaŭ tertremo aŭ suneklipso...

La regnestroj donos ja neniam nenion; de ili, kion ni deziras, ni devas mem forpreni...

Laŭ logiko la plej unua paŝo de la revolucio kaj samtempe ĝia ĉefa devo estas liberigi la preson. Tiun ni faros! La ceteron mi lasos al Dio kaj al tiuj, kiuj estas destinitaj daŭrigi la komencitajn; mi estas destinita nur por fari la unuan puŝon. Morgaŭ ni devos elbatali la presliberecon! Kaj se oni mortpafados nin? Nu, eĉ se estos tiel, kiu povas atendi pli belan morton ol tia?

Kun ĉi tiuj pensoj mi ekdormis. Frumatene mi rapidis en la kafejon de la junuloj... En la kafejo ni decidis, ke ni iros laŭvice al la studentaro kaj poste per plena forto ni komencos la grandan laboron. Unue ni iris al la kuracistoj... De tie al la inĝenieroj, de ĉi tiuj en la seminarion de la juristoj marŝis la amaso kreskanta ĉiumomente kaj laŭ la nombro kaj laŭ entuziasmo. En la halo de la seminario stariĝis antaŭ nin profesoro kaj diris kun granda patoso:

— Sinjoroj, en la nomo de la leĝo!

Liajn ceterajn vortojn supersonis la tondranta krio de la amaso, kaj la estimata profesoro ne povanta plu paroli, bele forvaporiĝis. La juristoj elkuris sur la straton, por unuiĝi kun ni... Jókai denove laŭtlegis la proklamon, kaj la dekdupunktan postulon, kaj oni deklamigis per mi la poemon „Nacia kanto". Ambaŭ estis akceptitaj per fanatika entuziasmo kaj la refrenan esprimon: „Ni ĵuras" ĉiufoje akre resonis la tuta homamaso, kiu staris sur la placo.

— Nun ni iru al la cenzuristo kaj subskribigu per li la proklamon kaj la poemon: „Nacia kanto"! — kriis iu.

— Al cenzuristo ni ne iros — mi respondis —. Ni konas plu nenian cenzuriston; for, rekte al la presejo!

Ili tuj konsentis pri tio kaj sekvis min.

La presejo de Landerer estis plej proksima al ni, ni iris tien. Oni elektis Jókai, Vasvári, Vidacs kaj min delegitoj por okupi la presmaŝinon. Ni faris tiun en la nomo de la popolo. Kaj tiam la dekdu-punktan postulon, kaj la poemon: „Nacia kanto" tuj oni komencis presi.

Malgraŭ la pluvego kvazaŭ 10 000 homoj kunvenis antaŭ la Muzeo, de kie laŭ la rezolucio ni iris al la urbodomo, ke la dekdu postulojn aprobu ankaŭ la civitanoj kaj ili unuiĝu kun ni.

La konsilantara salono malfermiĝis kaj unuafoje ĝi pleniĝis per popolo.

— Al Buda, — al Buda! — al la gubernatora komitato!... malfermigu la karceron de Táncsics!... al Buda!

Ĉi tiuj estis la plej volonte kaj plej multfoje aŭdeblaj krioj de la popolo... Akompanate de almenaŭ 20 000 homoj ni marŝis al Buda, al la gubernatora komitato kaj interpretis niajn dezirojn. La dignoplena gubernatora komitato fariĝis pala kaj moŝtis tremadi kaj post kvinminuta interkonsiliĝo konsentis ĉion. La militistaro ricevis la ordonon fari nenion, la cenzuro estis aboliciita, la pordo de la karcero de Táncsics malfermiĝis. La malliberan verkiston triumfe transportis la nenombrebla amaso al Peŝt.

Ĉi tio estis la 15-a de marto. Ĝiaj rezultoj estas tiaj, kiuj la tagon faris eterne memorinda en la hungara historio.

Kiel serio de eventoj, ĉi tio estus sendube ordinara; se ni rigardas ĝin, kio gi estis, komenco, tiam ĝi estas grandioza, glora. Pli malfacile estas por infano fari la unuan paŝon, ol por plenaĝa homo mejlojn piediri.

Peŝt, la 19-an de aprilo 1948.

Respublikano mi estas korpe kaj anime, tia mi estas de kiam mi pensi povas, tia mi estos ĝis mia lasta spiro...

La postepoko povas diri pri mi, ke mi estis malbona poeto, sed diros ankaŭ tion, ke mi estis homo de severa moralo, kio per unu vorto egalas kun respublikano, ĉar la devizo de la respublikano ne estas: „for la reĝon", sed „la pura moralo". Ne la disrompita krono, sed la senkorupta moralo, la solida honesteco estas la bazo de la respubliko. Sen tio vane vi sieĝos la tronon, kiel la titanoj la ĉielon, ĉar vi estos fulmobatitaj; kun tio vi ŝtonmortigos la monarkion, kiel David Goljaton.

Tr: Krisztina *Nyitray*

SÁNDOR PETŐFI:

AL ARBOJ FLUSTRAS TRISTA VENT'...

Al arboj flustras trista vent' aŭtuna
parolon ne aŭdeblan pli ol spiro.
Kion ĝi do rakontas? Sian kapon
la arboj reve lulas je la diro.
En posttagmeza horo mi komforte
sterniĝis sur la sofo de l'ĉambreto,
kun sia kap' en mia sino dormas
la edzinet' profunde en kvieto.

Sub unu mia man' la brustmontetoj
de l'dolĉa dormantino mole ondas,
l' alia man' preĝlibron mian tenas:
pri la liber-bataloj ĝi rakontas.
Tra la animo kuras ties ĉiu
litero fajre kiel la kometo...
Kun sia kap' en mia sino dormas
la edzinet' profunde en kvieto.

Vin oro logas, vipo pelas lukti
por la tiranoj, ho popolo sklava;
nur ekridetas la liber', kaj marŝas
jam la adeptoj al batalo prava,
kaj prenas, kiel de knabino florojn,
vundon kaj morton kun volonta
preto.
Kun sia kap' en mia sino dormas
la edzinet' profunde en kvieto.

Kiom da karaj vivoj jam forfalis
por vi, Libero! Kaj ĉu estis fruktoj?
Ja estos, se ne estis! La triumfo
estos la nia en la lastaj luktoj.
Kaj ankaŭ venĝos vi martirojn viajn,
terura estos tiu venĝ-impeto...
Kun sia kap' en mia sino dormas
la edzinet' profunde en kvieto.

Min preterŝvebas sanga panoramo,
la aperaĵoj de la temp' venonta:
la malamikoj de l'Libero dronas
en lag' de sia propra sango honta.
Tra mia kapo fulmoj ekzigzagas,
en tondron kreskas mia korfrapeto...
Kun sia kap' en mia sino dormas
la edzinet' profunde en kvieto.

Tr. K. Kalocsay

DE ORIET' ĜIS OKCIDENT'...

Petőfi eksterlande

Entuziasmige bela kaj samtempe ege malfacila tasko estas skribi pri la titole menciita temo. Tuj evidentiĝas, ke estus vana klopodo inde prezenti la mondreeĥon al nia poeto en strikte limigita amplekso, ja temas pri tempo pli longa ol kvin kvaronjarcentoj kaj aliflanke pri preskaŭ la tuta Mondo — do, legante ĉi studon, oni ne atendu la precizecon kaj ĝisfundecon de filologoj.

Studinte ĉi-rilatajn bibliografiojn (inter ili ankaŭ la ĝis nun plej kompletan, kompilitan dum jardekoj de bibliografo D-ro Tibor *Demeter* kaj sciencajn publikaĵojn de alia Petőfi-esploristo s-ro Róbert *Miklós*, kunlaboranto de Budapeŝta Petőfi-Muzeo — la aŭtoro de ĉi modesta provo ŝuldas esprimi sian dankon al tiuj du scienculoj, tamen nur fragmentojn li povas utiligi el ilia grandega laboro.

La poezio de la hungara poeto edukiĝinta per la ideoj de la franca revolucio kaj de la utopiaj socialistoj; batalanto de mondolibero; tradukinta Shakespeare-dramon (Korjolano), la romanon Robin Hood, poemojn de Shelley, de Moore, de Béranger kaj Moreau kaj tiujn de Heine kaj Schiller — ne restis longe sen reeĥo internacia.

Interese li konkeris unue la terenon de germanlingvanoj. La Aŭstria revuo Wiener Sonnstagblätter jam en 1845 publikigis tri poemojn de li, kaj en antologio „Ungarns Litteratur" (Vieno, 1846) aperis liaj 55 versaĵoj. Post tri jaroj jam memstaran Petőfi-poemaron povis ĝui la germanlingvaj legantoj. (Gedichte von Alexander Petőfi; Frankfurt am Main, 1849). Ni menciu la nomon de la tradukisto: Károly *Kertbeny*, kiu faris laboron pioniran kaj arte valoran. Parte al lia laboro estas dankeble, ke Petőfi baldaŭ iĝis konata en pluraj aliaj landoj. En 1850 aperis traduko de „Johano la brava" (Stuttgart) kaj de tiam ankoraŭ pli ol kvardek (!) menstaraj germanlingvaj Petőfi-volumoj. La lastajn redaktis prof. Steiner en GDR (1955, 1959).

En aliaj okcidentaj landoj la unuaj perantoj de la vivoverko de Petőfi estis hungaraj elmigrintoj. Ekzemple en Anglio la unuajn tradukojn faris geedzoj *Pulszky*. En 1861 estis eldonita la unua anglalingva Petőfi-poemaro, kaj tiun sekvis ankoraŭ aliaj dek. Inter la tradukistoj menciindaj estas John Bowring kaj N. Löw.

Franclingve la legantoj en 1856 povis legi unuafoje Petőfi-poemojn, kiam aperis la antologio „Poesies Hongroises". Krom hungaraj elmigrintoj gravan laboron plenumis la franca *Chassen*, kiu verkis ankaŭ eseojn pri la poeto. „Johano la brava" aperis en tri diversaj tradukoj (1877, 1920, 1937) kaj plurajn tradukojn oni eldonis je la centjara Petőfi-jubileo (1923). Inter la francaj interpretistoj de Petőfi ni trovas tiel eminentajn literatorojn, kiel ekzemple Jacques *Gaucheron*, Jean *Rousselot* k. *aliajn*.

Ankaŭ en Italio antologio prezentis la poeton unuafoje (Milano, 1859). Ekde 1863 estis eldonitaj pli ol dudek Petőfi-volumoj. Al Umberto Norsa kaj Folco Tempesti apartenas la plej sukcesaj tradukoj Italiaj.

Sur ruslingva tereno ekde 1873 aperis Petőfi-poemoj, kaj pluraj memstaraj volumoj eldoniĝis en la jaroj de la jarcentŝanĝo, sed la veran rekonon de Petőfi alportis la Oktobra Revolucio. Multe kontribuis al la tradukado hungaraj verkistoj elmigrintaj post la falo de Hungara Konsilia Respubliko kaj eminentaj sovetaj literatoroj: Vera *Imber*, *Martinov*, *Pasternak* kaj *Tiĥonov*. Al la unua Sovetia eldono verkis antaŭparolon A. *Lunaĉarskij*. La plej grandan eldon-nombron atingis la kajeroj, aperigitaj en 1942 kaj disdonitaj inter batalantaj soldatoj sub la titolo „Ni deŝiros la standardon germanan". Krom la ruslingvaj volumoj aperis en Sovetunio ankaŭ armena, azerbajĝana, baŝkira, estona, gruza, kazaha, kirgiza, moldavia, tatara, turkmena kaj ukraina eldonoj. — Anstataŭ longa listo de pluraj alilingvaj eldonoj staru ĉi tie ciferoj: *el la 770 poemoj de Petőfi naskiĝis 33 000 tradukoj en ĉ. 55 lingvoj.*

Eĉ dum la kompilado de tiu ĉi artikolo, en la lastaj tri tagoj aldonis la gazetaro iom al la menciindaĵoj, jen:

— En Kuba Respubliko baldaŭ aperos pli nova hispanlingva eldono,

— La franca revuo „Europe" dediĉos sian unuan venontjaran numeron al Petőfi,

— Temas pri novaj estona kaj latva eldonoj...

Kaj ni daŭrigus ankoraŭ longe: la temo estas neelĉerpebla. „Johano la brava" trovis hejmon ne nur en Felando, sed en pluraj aliaj landoj de Oriento ĝis Okcidento kiel „Jean le preux", „L'eroe Giovanni", „Bohatyr Jan", „Ritter Johann", „Janko Viťaz" kaj „János Sankari" — samkiel la poeto trovis hejmon en la tuta Mondo.

Kio estas la sekreto de tiu popularecо? — Eble tio, ke en la poezio de Petőfi estas samtempe specife hungaraj kaj universale homaj la Belo kaj Vero.

M. FEJES

La ĉambro, kie naskiĝis Petőfi



LIBERO KAJ AMO de ALEKSANDRO PETŐFI

— I. —

De la infanaĝo mi konservis nevelkeman inklinon al la fabeloj, kaj el ĉiuj tradukoj de Kalocsay mi ĉiam favoris kun aparta tenero lian unuan esperantan version de *Johano la Brava* aperintan en 1923, cent jarojn post la naskiĝo de Petőfi. Estas kvazaŭ juneca amo, kiun oni gardas en sekreta angulo de la koro.

Du francaj verkistoj havas biografie almenaŭ unu komunan trajton kun Aleksandro Petőfi: ili malaperis en milito, kaj oni ne konas precize la lokon, kie ili falis; la cirkonstancoj iom misteraj de ilia morto aldonis suplementan, iasence romantikan, gloran aŭreolon al ilia — eĉ sen tio jam vasta populareco. Unu estas Henriko Alain-Fournier, aŭtoro de *Le Grand Meaulnes*, mortinta 28-jara en 1914. La alia nomiĝas Antono de Saint-Exupéry, aŭtoro de *La eta princo* kaj de aliaj verkoj, pereinta en 1944 (la 31-an de julio, kiel la hungara poeto). Ambaŭ francaj rakontoj, *Le Grand Meaulnes* kaj *La eta princo*, posedas la virgan freŝon, ravan fabelecon, profundan poezion, kiajn oni admiras en la ĉefverko de Petőfi, *Johano la Brava*. Tiu ĉi miniatura epopeo, en formo de versa popolfabelo, rakontas kun senmanka gracio, naiva ĉarmo, suka vervo la aventurojn jen realajn, jen miraklajn de juna ŝafisto. Dua reviziita versio aperis en 1948, sed ĝin mi ne konas.

— II. —

Tre grava evento estas la eldono de *Libero kaj Amo*, plaĉa volumo inda je la renoma tradicio de Corvina, kaj kiu entenas, krom *Johano la Brava* kaj *La Apostolo*, nemalgrandan parton de la lirikaĵoj de Petőfi, ĉiuj en traduko de Kalocsay, el kiuj pluraj jam aperis en *Eterna Bukedo, Hungara Antologio* aŭ dise en gazetoj kaj revuoj.

Petőfi estas la unua lirika poeto hungara de internacia famo kaj formato. Lia poezio prezentas ĉiujn kvalitojn de la vera popola poezio. Malmultaj poetoj konis jam dumvive similan gloron, posedis tian povon de envulto, estis tiel profunde popolaj, tiel proksimaj, tiel senpere alireblaj, tiel emocivekaj por ĉiu leganto, sendepende de ties intelekta nivelo kaj kultura grado, ĉar li disponis tre maloftajn dotojn: la eternan junecon, naturecon, gracion, ian seninhibician disradiadon, spontanan amon al la vivo kaj al ĉio viva. Lia apero en la hungara beletro kompareblas iel al tiu de Puŝkin en la rusa.

En „Studo pri la hungara literaturo" (vidu en *Hungara Antologio)* unu el la plej kleraj kaj penetraj spiritoj, Mikaelo Babits, tre bone karakterizis la signifon de Petőfi, ne nur laŭ la nacia, sed ankaŭ laŭ la eŭropa vidpunkto. Al tiu teksto, kiun kompletigas per abundaj informoj la ĵusa enkonduko de Kalocsay, oni povas apenaŭ ion aldoni, se ne ripeti la laŭdojn, rediri la motivojn de admiro.

En la epoko de Petőfi la „puszta" (dezerta stepo) kompare pli vastis ol la „alföld" (granda ebenaĵo kulturita) — okcidentano ne konanta Hungarion ofte konfuzas la du — kaj ambaŭ forte inspiris la junan poeton, kvazaŭ ili simbolus por li la liberon, tiel karan al lia animo. La arbaro kaj la monto lin malpli logas. Amo al la naturo, precipe al tiu vasta hungara ebenaĵo, esprimiĝas ĉe li per himnoj de ĝojo, sen ia sentimentalo. La ĉardo, kie vespere renkontiĝas la kamparanoj, la flugantaj cikonioj, la tintado de la sonoriloj kiam la brutoj revenas, la rapida rajdanto, la blonda Tibisko, kiu lante fluas, la vera rivero le l'Alföld, ĉio tio estas vive kaptita kaj redonita en kanzonoj per sugestie aperiga talento.

Malpli sukcesa en longspiraj poemoj — kun escepto de *Johano la Brava* — Petőfi eminentas en la kurtaj pecoj, ĉar li majstre koncentras, gajnas en profundo tion, kio mankas en vasteco. La plej sukcesaj lidoj de Heine aŭ de Burns eble solaj donas ideon pri tiuj ravaj juveloj. La popolo en sia ĉagreno, la paŝtisto, la mizerulo, la pacience klinita kampulo, ĝis tiam ignorataj en la nacia poezio, ricevas kun li la civit-rajton, antaŭ ol ili ĝin konkeris en la politika vivo.

Lia propra aventura sorto, liaj amoj, la fervora adoro, kiun li dediĉis al la patrino, al la edzino, al la infano, trovas ĉe li la plej kortuŝan esprimon. Sed Petőfi restas ankaŭ la arda poeto de la revolucio hungara, kiun li inaŭguris la 15'3'1848 per sia patriota kanto *Leviĝu, hungaro!*

— III. —

Okaze de la 150-a datreveno de la naskiĝo de Petőfi, oni certe komentos abunde kaj detale — por la hungara publiko — lian vivon, verkon kaj ties signifon. Ĉi tie, mi devas min limigi al la traduko de Kalocsay, ĉar ja nur per liaj vortoj mi povis ekkoni kaj admiri la elektitajn poemojn.

En la unua eldono de *Johano la Brava*, la tradukinto avertas, ke li uzis sufiĉe ofte asonancojn, kaj pro ili jam ricevis riproĉojn kaj mallaŭdojn. Pro la honoro de nia movado, mi sincere esperas, ke tia triviala speco de „kritiko" definitive malaperis, ĉar en la lasta versio la proporcio de la asonancoj atingas 9%. Cetere ne temas pri la hispana asonanco, sed pri speco delonge hejmigita en Esperanto (plej diverĝaj estas eble *tagoj/knaboj, korpo/volbo).* Ankoraŭ ne tute ĉesis disaj plendoj kontraŭ la neologismoj: *desaponti, devanci, disdegni, disipi, hida, mava, pita* kaj aliaj novaĵoj donos al kelkaj tarduloj novan okazon por lamenti. Oni asertis, parte prave, ke Kalocsay estas *mal*-evitulo. Tamen en lia traduko, tiu grava prefikso ja

aperas pli ol 250-foje (meznombre 1 por ĉiu paĝo, sed, okaze, 3-foje en la sama strofo!):

Lasu la malĝojon, Reĝo kaj Majesto,
Ni la malpiulojn igos danci plore,
Kiuj vin ofendis tiel malhonore.

Karakteriza trajto de la stilo estas la ripeto, en du sinksekvaj versoj aŭ en strofo, de la sama vorto aŭ radiko. Tiaj ripetoj okazas pli ol centfoje en la tuta volumo. Ili estas tipaj de la popol-rakonta maniero, kiu ne timas insisti pri ideo, kvazaŭ por doni al ĝi ian sugestie sorĉan povon. Tiu praa procedo uziĝas ankaŭ en la Biblio, kaj ne maloftas ĉe Zamenhof, ĉefe en liaj didaktikaj tekstoj. Jen, kiel simple Petőfi rakontas:

Sed ne de l'rivero al la brilo onda,
Sed en la rivero al knabino blonda,
De l'knabino blonda al la svelta korpo.

aŭ

Nur surŝultre zumas lia pelto peza,
Kredis li, ke l'pelto pezas sur la kolo,
Kvankam pez' plej granda estis lia koro.

aŭ

Manĝis reĝ' kaj filoj; kiom, scias Dio.
Kion ili manĝas, ja vi ne divenas,
Pensu ja: rokŝtonojn ili manĝe prenas.

Estas interese noti la vortojn plej favoratajn de Petőfi, kaj tiujn kompari kun la „ŝlosil-vortoj" statistike registritaj ĉe okcidentaj poetoj naciaj aŭ esperantaj. Apud *koro, amo, sango, vento, libero* ĝenerale oftaj ĉe la lastaj, abundas mencioj pri *patrino* (panjo), *edzino* kaj *rabisto* (bandito, ŝtelisto, latrono): la multaj migradoj de la poeto donis al li okazon *eble* renkonti banditojn, kaj *certe* ofte sopiri al la adorataj patrino kaj edzinjo.

Legante tiujn poemojn, mi plurloke malkovris tonojn iomete similajn al tiuj de Julio Baghy, kiu ja povis inspiriĝi de la plej popularа nacia poeto, kvankam pro sia esenco mem la modelo restas neimitebla. Oni diris, ke Baghy estas „la poeto de la popolo" kaj Kalocsay „la poeto de la poetoj". Tamen mi sincere kredas, ke Kalocsay kapablis pli sukcese kapti kaj redoni en siaj tradukoj la popolan fibron kaj aromon. La tradukinto de *Masonisto Kelemen, de Anjo Molnár,* de *Máté Biró* kaj de aliaj anonimaj baladoj kaj romancoj plene identiĝis kun la popola inspiro. Apud la forma majstreco kaj subtila percepto de la ĝusta tono, li sciis meti grandan amon en la plej etajn detalojn de poemo.

Aleksandro Petőfi ne povus trovi, ĉe la internacia publiko, pli fidelan, pli sindediĉan kaj pli genian interpretanton.

Henri Vatré (Svislando)

LA GRAFO DE PETŐFI

Okaze de la 150-jara datreveno de Sándor Petőfi ne estos seninterese memori pri unu el liaj plej bonaj amikoj: ***grafo Sándor Teleki.***

Petőfi estis pasia plebano-revoluciulo, malŝatanto de reĝoj kaj magnatoj, do lia intima rilato al grafo ŝajnas preskaŭ absurda. Kiel okazis ilia alproksimiĝo, tion rakontas la grafo mem en siaj memuaroj. En 1846 okazis departementa kunveno en la urbeto Nagy Károly, tiun kunvenon partoprenis la grafo, kaj venis tiam en la urbon ankaŭ Petőfi. Oni prezentis ilin unu al la alia. Petőfi tiam diris: „Vi estas la unua vivanta grafo, kun kiu mi parolas". „Nu, — demandis la grafo, —, ĉu grafon mortintan vi jam vidis ?" „Ankaŭ mi mem estis mortinta grafo, kiam mi aktoris" — rediris Petőfi. „Nu, per mi ne multe vi gajnos — diris Teleki —, ĉar ankaŭ mi estas nur tia sovaĝa grafo". Kaj li invitis la poeton al sia tablo, kie tiuvespere ili amuziĝis kune, vere amike. (La mortintan grafon Petőfi ludis en „La Rabistoj" de Schiller.)

Poste, kiam Petőfi edziĝis, la grafo flugigis lin per kvarĉevala kaleŝo al Erdőd, al lia fianĉino, kaj de tie, post la geedziĝo, la novan paron al sia kastelo en Koltó, por ke ili pasigu tie siajn mielsemajnojn. Tridek du poemoj eternigis tiun dolĉan restadon.

La „sovaĝa grafo" cetere, vivis aventuran vivon. Tute junaĝe li implikiĝis en la aferon de Don Carlos, hispana tronpretendanto, poste batalis por la libereco de la vaska popolo, kiun li trovis iom simila al la sikuloj de Transilvanio. Lia majstro estis Francisko Liszt, la granda muzikisto; li ankaŭ duelis pro li kun orgojla prusa oficiro ofendinta la majstron. En 1848. dum la hungara liberec-milito li estis registara komisiulo de la revolucio, poste kolonelo sub la legenda generalo Bem kaj ĉefinspektoro de la Transilvania armeo. Tie servis ankaŭ Petőfi kaj ili renovigis sian amikecon. Petőfi poste falis ĉe Segesvár kaj la hungara armeo devis demeti siajn armilojn pro la enmiksiĝo de rusa armeo ĉeflanke de la aŭstrianoj. Nia grafo fariĝis malliberulo kaj oni fermis lin en la kazematojn de Arad. Aparta historio estus rakonti, kiel li sukcesis fuĝi de tie, kaj kaŝiĝi jen ĉe la nababo de Temes, Peter Csernovics, jen ĉe la banditestro Sándor Rózsa. Fine li eskapis tra Balkano al Turkujo, kaj de tie al Parizo, kie lin atendis lia unua granda amo kaj... la prizono de la ŝuldantoj. Poste li fariĝis laboristo en sebfabriko sur la insulo Jersey kaj amikiĝis kun Victor Hugo. Tiel li sciiĝis, ke hejme oni lin kondamnis je morto, kaj inter tambursonoj kaj kun soldata parado la ekzekutisto najlis la literojn de lia nomo sur la pendumilon. Tiam li vojaĝis al Italio kaj anoncis sin ĉe grafo Cavour, kune kun alia famulo István Türr, por batali sub la flagoj de Garibaldi por la itala libereco. Grafo Cavour konfirmis lian rangon de kolonelo, sed lin atentigis, ke la aŭstrianoj, se ili lin kaptos, lin pendumos sen juĝa procedo. „Ho, — ridis la sovaĝa grafo —, ĉu la duan fojon?" „Kiel do?" — demandis Cavour. „Nu, ĉar oni jam pendumis min unufoje, dum mi matenmanĝis kun du amikoj en la Pariza kafejo Foy."

La grafo brave trafaris la bataladon por la unueca Italio kaj poste flugis plu sur la kaleŝo de la aventuroj, foje-foje prenante al si virinon en tiun kaleŝon, kiel la francan Clemence, la anglan „lady" Jane kaj la italan Matild el Napoli. Ĉi lastan post la fino de sia 18-jara ekzilo li hejmenportis kaj ŝi fariĝis la estrino de lia kastelo en Koltó. Li mortis en 1892 kaj oni enterigis lin en sia hungarsoldata kolonela uniformo en Koltó sub la kornuso nomata „la arbo de Petőfi". Tiel ankaŭ lia tombo kunligas la memoron de la revolucia poeto kaj la sovaĝa grafo.

P. Balkányi.

Deklaro
de gvidantoj de dudek naŭ eŭropaj ĉefurboj

La jubileo de Budapeŝto: la 100-jara datreveno de unuigo de la praaj hungaraj urboj, Buda, Pest kaj Óbuda donis eblon por tio, ke la unuan fojon en la historio de nia kontinento la gvidantoj de la ĉefurboj de Eŭropo traktadu komune. Ni ĝojas, ke ni, gvidantoj de ĉefurboj vivantaj inter diversaj sociaj cirkonstancoj kaj portantaj grandan respondecon, renkontiĝis.

En niaj ĉefurboj akumuliĝis nepritakseblaj materialaj kaj kulturaj valoroj. La ŝirmo kaj plua riĉigo de tiu ĉi nerefarebla heredaĵo dependas de gardo de la paco. La kreantoj de valoraĵoj ne devas timi, ke la rezulto de ilia laboro iĝos ruino kaj cindro. Nia komuna celo estas, ke ekirante el rekono de la realaĵoj, ni povu agadi en atmosfero de la sekureco kaj kunlaborado por intereso de evoluado de niaj ĉefurboj kaj por bonfarto de la loĝantaro.

Tiu ĉi rekono instigas nin ĉiujn, por estigi inter la eŭropaj ĉefurboj pli striktajn interrilatojn. Ni rigardas nia tasko, fari ĉion por la laŭtempa scienca, teknika kaj socia progreso, por la paco kaj sekureco de la popoloj, por plibonigo de la vivkondiĉoj de la generacioj de la hodiaŭo kaj morgaŭo.

Ni faros efikajn disponaĵojn por venki super la malpuriĝoj pliiĝintaj en la homa medio kaj endanĝerigantaj la logantaron. Ni agados por tio, ni koncentros niajn fortojn — kalkulante je la subteno de niaj registaroj —, por certigi sanan medion por la loĝantaro.

Granda travivaĵo de nia renkontiĝo estas, ke ĝi proponis eblon por disvolvi la kunlaboradon de la ĉefurboj de nia kontinento. Ni opinias nian nunan kunvenon fruktodona ankaŭ pro tio, ĉar ĝi povas esti esperiga uverturo de niaj pluaj renkontiĝoj, kiuj kontribuos al la stabiligo de niaj reciprokaj interrilatoj, evoluado de niaj urboj kaj riĉiĝo de la vivo de nia loĝantaro.

Nia firmega intenco estas: per fido, kompreno kaj kunlaboro kreskigi niajn fortojn por efektivigo de niaj universalaj celadoj. Nia konvinko estas, ke tiu ĉi decido kaj la kunlaboro mem estos fruktodona kaj servos la bonon de nia kontinento.

Budapest, la 28-an de septembro 1972.

La partoprenantoj
de la Budapeŝta Renkontiĝo
de gvidantoj de la eŭropaj ĉefurboj

PETŐFI EN ESPERANTO

Estas interesa, sed ne surpriza fakto, ke en la komenco de la jarcento esperantistaj tradukistoj unue alfrontis en ĉiuj landoj la verkojn de siaj grandaj naciaj poetoj de la 19-a jarcento: Mickiewicz, Puŝkin estis inter la unuaj esperantigitaj aŭtoroj. Tiu ĉi tendenco ŝajnas sufiĉe facile klarigebla: la facilaj poemformoj, relative simpla lingvaĵo, plaĉa ritmo, nerafinita komunikmaniero faris tiujn poetojn aparte taŭgaj por la trejnado de la esprimpovo de la nova lingvo. (Kompreneble ofte tiuj tradukoj ne estis pli ol nura „transkodado" de la vortoj kaj ritmoskemo: la plej signifa elemento, la ĉarmo de la fea simplo dronis inter la ŝvitodoraj versoj. Tamen tiuj tradukoj — eĉ nun, post la brilaj esperantigoj de Heine kaj Petőfi — meritas nian atenton kaj respekton, ja ili celis noblan aferon, diskonigante la trezoron de bonaj naciaj literaturoj, aliflanke, la ĉizado, fajlado estis tre bonvena por la tiam ankoraŭ „sovaĝa" Esperanta literatura lingvo.)

En Hungarlando kompreneble la unuaj esperantistaj tradukistoj ekatakis la poezion de Petőfi. Ili estis multaj: Á. Marich, I. Fidler, la surprize lerta R. Rajczi kaj Eŭgeno Fuchs, kiu estis nur unujara esperantisto, kiam en 1910 aperigis 55-paĝan kajeron sub la titolo Elektitaj poemoj de Petőfi (Lia traduko de Johano, la Brava — „Johano, la Bravulo" — restis en manuskripto.) Tamen ĉi tie ni dediĉu kelkajn liniojn ne al lia sendube respektinda laboro, sed al nehungara esperantista poeto, Antoni Grabowski.

En lia mirinda El Parnaso de Popoloj (1913) aperis du poemoj de Petőfi (p. 68—70.): unu mallonga kaj alia pli longa. Staru ĉi tie la pli kurta (La amo kaj liber'...), kiu, kompreneble, ne eltenas la komparon kun la Kalocsay-a traduko (Libero kaj amo, p. 125.); per komparo evidentiĝas, ke li tute miskomprenis la poemon.

La amon kaj sendependecon,
Nur ilin kore mi rekonas;
Al mia amo — liberecon,
Mi amon al patruj' fordonas.

La alia estas Patriota kanto (ĉe Grabowski la du poemoj aperas, kvazaŭ ili kunapartenus), kiu, kvankam same postrestas al la traduko de Kalocsay, havas nekontesteblajn virtojn, precipe, se ni konsideras la fakton, ke Grabowski probable ne sciis la hungaran (kvankam la tradukoj enkondukiĝas per citaĵoj el la hungara originalo) kaj uzis iun el la ne tro elstaraj germanaj tradukoj.

Mejloŝtono en la Petőfi-tradukado estis en 1923, la unua eldono de Johano la Brava, kaj de tiam Kalocsay ne havas veran rivalon sur tiu ĉi kampo. Ĉiuj tradukoj, faritaj de antaŭuloj, kaj ankaŭ eventualaj postaj provoj — kiel konjektigas al ni la nesuperebla kolekto Libero kaj Amo — havos ŝancon nur por senmorteco bibliografia.

Vilmos Benczik

BUDAPEŜTA RADIOTEKNIKA FABRIKO

Budapest, III. Polgár u. 8-10
Telefono: 686-080. Telex: 22-5928

KASETA INDIKKOLEKTUJO

NI INFORMAS NIAJN
KARAJN KLIENTOJN, KE
LA BUDAPEŜTA RADIOTEKNIKA
FABRIKO ALLIGIĜIS
AL KOMPUTERPROGRAMO

TIBOR DÉRY:

REMI-ROMEO

Sinjoro profesoro Schubert loĝis en sudgermana urbeto, proksima al la svisa landlimo. Unu duono de la urbo konstruiĝis sur montetoj, alia duono, kun malnovaj domoj, kun zigzagaj stratoj kaj kun sia mondfama katedro, konstruiĝis sur la ebeno sterniĝanta sub la montetoj. La gejunularo de la urbo printempe supreniris sur la montflankon por interkisadi, aŭtune ili iris al la ebeno por geedziĝi. Sed okazis, ke vintre, promenante en la altaj parkoj, sub la prujnaj arboj, en la frosto, jen kaj jen oni ekvidis senmovan amparon, efikantan en sia muteco kiel statuogrupo forgesita tie el la somero.

Sinjoro profesoro Schubert loĝis en ĉi tiu urboparto kreita por amo kun sia edzino nomata Elly kaj kun sia hundo Mini. Ilian villon ĉirkaŭbaris granda ĝardeno, en kiu Mini, la nigramakula, drathara foksteriero, vintre-somere kaj tage-nokte vivis tiel libere kaj gaje, ke eĉ ĝiaj gemastroj enviis ĝin kelkfoje en siaj malbonhumoraj momentoj. Al iu el tiaj iom impetaj eksplodoj de envio estas atribueble, ke ili decidis, konigi al Mini la dolĉojn de la amo. La vivo ne estu por ĝi tiel facila, ili pensis certe, evidente kun straba flankrigardo al la militoj, al la ekonomiaj krizoj, al la konfesiaj, rasaj kaj sociaj problemoj, kiuj ilian propran homan vivon senĉese ĉinkaŭondadis.

Mini estis blanka kiel ĉasto, ĝiaj kvar piedoj estis rektaj kaj rigidaj kiel kvar bastonetoj, ĝia muzelo estis broseska kaj ridrikana, kun granda nigra makulo ĉirkaŭ la maldekstra okulo, ĝia korpo estis elasta, kvazaŭ konstruita el ŝtalrisortoj, kaj ĝiaj okuloj estis tiel friponete, tiel dolĉe kaj serene brilaj, vivantaj, gaje viglaj kaj impertinentaj, ke oni povis veti per cent kontraŭ unu, ke eĉ la plej morozan fraŭlon ŝi ravos, se venos ties vico. Nome Mini estis damseksa. Rigarde al ŝia raspureco kaj junaĝo, ŝiaj gemastroj ĝis nun ne donis al ŝi okazon, por ke iun ajn ŝi ravu.

Sed nun, ŝajnas, tiu ĉi senzorga vivo devos ĉesi, ĉar sinjoro profesoro Schubert, pere de la loka grupo de la societo de la hundamikoj, interkoniĝis kun sinjoro profesoro Bierbaum, kiu parte lekciis fiziologion en la universitato de la urbo, parte estis posedanto de raspura, virseksa, drathara foksteriero, kun la nomo Remi. Estis majo, la naturo estis en plena burĝonado, eĉ en la plej malvastajn kaj plej maljunajn stratojn de la urbo penetris el la montflankoj la odoro de la ĝardenoj, la parkoj estis plenaj de reve promenantaj paroj. Sinjoro profesoro Schubert, en la nomo de Mini, sciigis sinjoron profesoron Bierbaum, ke lia ŝirmatino estas ema ligi provizoran nupton kun la raspura Remi. Profesoro Bierbaum akceptis la sciigon, poste la du sinjoroj iris hejmen, ambaŭ al sia propra edzino, ke ili priparolu, kiel konvenas al zorgemaj gepatroj, la pli proksimajn detalojn de la afero. Mini-n kaj Remi-n neniu el ili pridemandis.

En sunbrila printempa tago sinjoro profesoro Schubert pilgrimis al sinjoro profesoro Bierbaum, kiu loĝis en la alia fino de la urbo, en pli ol duonhora malproksimo, kaj tagmeze, antaŭ la tagmanĝo-tempo, kun Remi en la brako, li eniris en sian propran loĝejon. La du brosesk-muzelaj, gajaj kreaĵoj, ekvidante unu la alian, eksplodis en kapturna bojado, kaj transformiĝante je du aŭtomate moviĝantaj, buleskaj, blankaj aperaĵoj, fulmrapide ruliĝis unu post la alia, el unu fino de la loĝejo al la alia, poste subite ili kuregis en la ĝardenon kaj por longa tempo ili malaperis de antaŭ la okuloj. Kiam vespere malsate kaj hirte denove ili envenis, en la familio Schubert formiĝis la opinio, ke ĉi tie du koroj trovis unu la alian.

Dum unu tuta semajno la domo resonadis de la gajeco. La mastroj de la domo povis komunikiĝi en la ĉambroj nur kun la plej granda singardemo, ĉar neniam oni povis scii, en kiu momento galopos en sovaĝa impeto inter iliajn piedojn iu aŭ alia el la junaj geedzoj, eble ili ambaŭ. La petolaj ludoj de Mini kaj Remi estis tiel tempestaj, ke ili ne zorgis pri la korpa integreco de la mebloj, nek de sia vivanta medio; la servistinknabinon Mari foje ili renversis, ili manĝis plurajn divankusenojn, kaj kaŝis unu pecon de la pantoflo de la mastrino, tiel ke nur post duonjaro, aŭtune oni trovis ĝin dum mirtelkolektado, sub iu arbusto de la ĝardeno.

Sinjoro profesoro Schubert kaj lia edzino, Elly, eĉ la brava kaj foje renversita Mari, priatentis kun indulgema rideto la senindulgajn sed korgajigajn manovrojn de la kreaĵoj konfiditaj al ilia zorgo. Sed foje profesoro Schubert apelaciis je la homa digno, kiam la paro Remi kaj Mini dum ludado invadis lian laboratorion kaj renversis tablon kun du dekduoj da malplenaj retortoj, sed el la kazo li ne tiris kelke gravajn moralajn konkludojn. Se oni atente rigardis la vizaĝon de Mini, oni povis konstati, ke ĝi survestis pli molan kaj pli reveman esprimon ol antaŭe, ŝia rigardo estis serena, kaj jam ne tiel diabla kaj gaje vigla, sed pli dankema, cedema. Kaj la muzelo de Remi konstante ridrikanis kaj li bojetis tiel gajajn sonojn, kvazaŭ senĉese al li proponus nevideble la granda spirito de la foksterieroj blankajn kubsukerojn.

Post unu semajno profesoro Schubert surmetis sian ĉapelon, ligis Remi-n al rimeno kaj lin forportis dehejme. Remi ne komprenis, kio al li okazas, kaj nur tiam li rekonsciiĝis kaj komencis pli akran kontraŭstaron, kiam li rimarkis, ke sinjoro profesoro Schubert kun li entramiĝis. Tiel nedireble tristan, preskaŭ rompitan rigardon li ĵetis sur la ĝardenon kaj al Mini bojanta malantaŭ la ĝardenpordo, ke la bona koro de la sinjoro profesoro ekdoloris. Dum duonhoro ili vojaĝis sur la tramo al la loĝejo de sinjoro profesoro Bierbaum, kie la plene deprimita Remi tuj sin kaŝis sub la divanon, kaj ankaŭ sian mastrinon, kiu iom poste venis en la ĉambron, li salutis nur kun unu raŭka bojeto kaj per kelkaj lacaj vostosvingoj.

La sekvan tagon je la sesa matene sinjoro profesoro Schubert vekiĝis je danĝerminaca bojado. La bojado estis tiel degenerinta, triste jelpanta kaj korŝira, ke la profesoro leviĝis el la lito kaj iris al la fenestro. Malantaŭ la ĝardenpordo li ekvidis Remi-n, kiu starante sur siaj du malantaŭaj kruroj, ŝiradis per la antaŭaj piedoj la dratreton de la pordego kaj dume sen halto ploris kaj jelpis.

— Elly — diris la profesoro al sia edzino, — ĉi tie estas Remi!

— Kiel do? — demandis la edzino dormeme. — Ĉu hieraŭ vi ne portis lin hejmen?

— Nepre jes — diris la profesoro. — Sed ŝajnas, ke dum la nokto li fuĝis dehejme.

— Kiel li trovis la vojon ĉi tien? — diris la edzino vigliĝinte. — Gesinjoroj Bierbaum loĝas de ĉi tie almenaŭ unu kaj duonhoron de piediro kaj Remi nur dufoje faris la vojon: kiam vi lin portis ĉi tien, kaj kiam vi lin reportis.

— Ĉi tiu besto estas ia Romeo — diris la profesoro. — Certe dum la tuta nokto li kuradis kaj priflaradis, ĝis li trovis la vojon ĉi tien. Ŝajnas, pluvis dum la tuta nokto, ĉar la tuta besto estas nura akvo kaj koto.

La profesoro en noktoĉemizo malsupreniris en la ĝardenon kaj enlasis Remi-n, kiu en sia sovaĝa ĝojo lin preskaŭ renversis. Mini, kiu loĝis en la partero, en la kuirejo, komencis tian sovaĝan bojadon post la ŝlosita pordo, ke Mari timiĝinte preskaŭ falis el la lito. Sekvis unu nova paradiza tago por la du paradize senkulpaj bestoj.

Vespere profesoro Schubert prenis Remi-n surbraken kaj sur tramo hejmenportis lin en lian hejmon laŭ Bierbaum, ĉi-foje petante sian kolegon, ke por la nokto ili ŝlosu aŭ ĉenu la hundon. Sed ŝajnas, ke la ŝlosilo estis malbona aŭ la ĉeno malforta, ĉar la trian tagon matene precize je la sesa horo denove ekstentoris la saluto parolanta al la koro. Ĉi-foje sinjoro profesoro Schubert ekgratis sian kapon. — Kion ni faru? — li demandis sian edzinon. Tiu ektiris sian ŝultron. — Enlasu lin — ŝi diris —, ĉar li ne ĉesigos la blekadon! — La profesoro atendis kvaronhoron, poste li leviĝis, malsupreniris en noktoĉemizo en la ĝardenon, kaj enlasis Remi-n, kiu ŝajne ne rimarkis la iom morozan vizaĝesprimon de sinjoro profesoro Schubert.

La kvaran tagon, matene je la sesa, Remi denove aperis antaŭ la ĝardenpordego. La kvinan tagon li forrestis, kaj la sesan tagon li alvenis tagmeze. La sinjoro profesoro provadis novan metodon, li ne enlasis lin en la ĝardenon. Sed la du hundoj, Mini interne de la pordego, Remi ekster la pordego, faris tian inferan bruon, ke post unuhora pacienca atendado gesinjoroj Schubert devis cedi. Vespere, kiam la profesoro reportis Remi-n al lia mastro, inter la du sinjoroj komenciĝis pli longa interkonsiliĝo pri tio, kiel oni povus starigi baron kontraŭ la ĝene tempesta inundo de la amo. Rezulte de la interkonsiliĝo, Remi ne montriĝis dum du tagoj, sed en la sekva semajno li aperis ankoraŭ trifoje, en ĉiu okazo precize je la sesa horo matene.

Sinjoro profesoro Schubert, iun antaŭtagmezon, venante hejmen el la universitato, ascendinte sur tramon, sur la perono de la tramo ekvidis Remi-n, kiu, retiriĝinte en angulon, silente sidis sur siaj du malantaŭaj piedoj kaj faris tiel, kvazaŭ li ne rimarkus la profesoron. Tiu ĉirkaŭrigardis, serĉante lian mastron, sed nek kolegon Bierbaum, nek ties edzinon li vidis sur la tramo.

— Kun kiu vojaĝas tiu ĉi hundo? — li demandis fine la konduktoron.

La konduktoro ekridis. — Sola — li diris —, tute sola! Jam la duan semajnon li vojaĝadas tiel sola, regule matene, li kutimas atendi la unuan veturon de la tramo ĉe la haltejo de la strato Reinhold, tie li suprensaltas sur la tramon, retiriĝas en angulon kaj descendas ĉe la strato Schöneck. Ja kompreneble — li aldonis — ankaŭ por hundo la vojo estas longa ekde la strato Reinhold ĝis la strato Schöneck!

Ĉe la strato Schöneck la profesoro kaj la hundo descendis de sur la tramo kaj kune ili eniris en la domon. Remi estis la plej ruza foksteriero, kun kiu renkontiĝis sinjoro profesoro Schubert en sia vivo.

Tradukis: LAJOS TÁRKONY

Dum Via vojaĝo en Hungario certigas Vian komforton

EN STACIDOMOJ
restoracio, bufedo, nutraĵpavilono
EN TRAJNOJ
litvagono, restoracivagono, bufedvagono
EN ŜIPOJ
restoracio, bufedo
EN LONGDISTANCAJ AŬTOBUSOJ bufedo

25 jaroj en la servo de la vojaĝantoj

UTASELLÁTÓ

1948 PASAĜERPROVIZEJO 1973

Favorpreze certigas la manĝigadon de turistaj grupoj la Pasaĝerproviza Entrepreno. Informojn donas kaj laŭdezire skribitan informon sendas la Pasaĝerproviza Entrepreno, Budapest V., Veres Pálné u. 24
Tel.: 189-900/160

panoramo

En Budapeŝto la reprezentantoj de eksterlandaj bankoj subskribis interkonsenton, laŭ kiu la Hungara Nacia Banko emisios longvalidan prunt-obligacion sur la internacia financa merkato. La sumo de la prunto estas 50 milionoj da dolaroj, la interezo estas 8,5 procentoj, la limdato de la repago: 15 jaroj, la emisia kurzo estas 100 procentoj.

La pruntnegecon organizis la Britlandaj financinstitutoj, kiuj efektivigis la pasintjaran emision. Ili estas: National Westminster Bank, Moscow Narodny Bank kaj Morgan Grenfell and Co. Kun ili kunlaboras la institutoj Associated Japanese Bank (International) Ltd., Bank für Gemeinwirtschaft AG., Bank of America Ltd. kaj Japan International Bank Ltd. La obligacion oni registros en la Londona borso.

La obligacio estas financkaraktera prunto, kiun la eksterlandaj bankoj registras. Konforme al la praktiko, aplikata ĉe la Hungara Nacia Banko, ankaŭ tiu ĉi prunto havas la celon, ke per la interveno de internaciaj fontoj ni kompletigu niajn internajn eblaĵojn en la intereso de la pli rapida disvolvo de nia ekonomia strukturo kaj por la kreskigo de nia eksportkapablo.

— o —

Kiel parton de la Evoluiga Programo de la Unuiĝintaj Nacioj (UNDP), UNESCO kontraktis por 5 jaroj kun la Hungara Scienca Akademio, pli precize kun unu el ties institucioj, la Biologia Esplorcentro en Szeged, por estigo de internacia pluevoluiga centro.

Kvankam en la Biologia Centro de Szeged oni komencis labori nur en 1971 kaj la laboratorioj de la biofizika, biokemia, genetika kaj planto-biologia institutoj estos tute pretaj nur en 1973, la tie kuranta scienca laboro jam vekis interesiĝon kaj rikoltis rekonon en pluraj landoj. Al tio estas ŝuldebla ankaŭ la subtenado fare de UNDP. Tiu institucio helpas per 1,2 milionoj da dolaroj la pluan disvolvon de la instituto, konstruiĝanta por 400 milionoj da forintoj.

Krom la bazaj esploroj, la celo de la 5-jara kontrakto estas doni en Szeged la eblon al la pluinstruado de la biologoj-fakuloj. Per tio oni intencas helpi la disvolviĝon de la medikament- kaj nutraĵindustrio, agrikulturo kaj medicino unuavice en la evoluantaj landoj.

— o —

La verkistoj kaj artistoj, kiuj okupiĝas pri t. n. „sci-fi" (sciencaj-fikciaj) temoj, kongresis en Trieste. En la kongreso ricevis premion la grafikisto András Sáros por sia novelo, Lajos Mesterházi por sia romano, László Urbán por sia studo, krome la televido-reĝisoro András Rajnai kaj la dramaturgo Antal Jánosi por sia televido-poemo „Kanto pri la Galaktiko."

— o —

Inter la san-difektadoj de la moderna epoko, apud la malpuriĝado de la aero kaj akvoj oni kutimas paroli ankaŭ pri la per-brua sandifektado, kiu en grava kazo povas kaŭzi surdetecon aŭ surdecon, krome ankaŭ pri la same aŭdo-difekta efiko de la ĉiam pli multe da kemiaĵoj. Inter aliaj ankaŭ tio ĉi estis unu el la ĉefaj temoj de la internacia aŭdologia kongreso, kiun oni aranĝis en Budapeŝto oktobre de la pasinta jaro. La kongreson partoprenis 600 personoj el kvar kontinentoj.

Biblioteko en cigaredskatolo



— Gyula Janka, direktoro de la Universitata Presejo en Budapeŝto, malnova presisto-fakulo, estas zeloto de miniaturaj libroj. Li akiris la unuan pecon de sia kolektaĵo el 368 volumetoj antaŭ dek jaroj. De tiam li tenas la kontakton kun multaj eksterlandaj fak-kolektantoj, estas konstanta korespondanto de la Guttenberg-Muzeo en Mainz. En grandeta cigaredskatolo havus por si lokon la valora biblioteketo, kies etaj libromajstraĵoj laŭdas la fakan scion de la plej eminentaj presistoj kaj bindistoj.

Sur manplato estas la angla-eldona „Nova Testamento", la „Angla Almanako" el 1843, la hungareldona minilibro „Artur Székely — de kvindek jaroj presisto" kaj la itallingva elektaĵo de poemoj de Leopardi.

— o —

Antaŭ 100 jaroj, en 1872 la hungara parlamento balotis tiujn 50 mil forintojn, el kiu sumo oni aĉetis artobjektojn el la materialo de la Viena artindustria mondekspozicio de 1873, kaj per tio oni meis la fundamenton de la Hungara Artindustria Muzeo. La materialo de la muzeo nun konsistas el 60 mil artobjektoj. Ĝia kolekto de orientaj tapiŝoj sekvas post la plej konata Viena materialo, ĝiaj secesiaj artobjektoj estas senkomparaj en Mez-Eŭropo. La jubileajn solenaĵojn — okazigitajn ĉi-jare en oktobro, kadre de la ĉiujare aranĝata „monato de la muzeoj kaj artmemoraĵoj" — partoprenis ankaŭ multaj gvidantoj de artindustriaj institucioj el Eŭropo.

— o —

En niaj orientaj departementoj sur teritorio de 600 hektaroj oni produktas drogherbojn, gravajn medikament-bazsubstancojn, ekz. dolĉkuminon, digitalon, aneton, pipromenon kaj kamomilon. El papavokapsuloj oni kolektis la produkton de unu kaj duono da hektaroj kaj oni kolektis en granda kvanto ankaŭ sovaĝe kreskantajn drogplantojn. La duonon de la prilaborita kamomilo oni liveris al Usono, G.F.R., Italio kaj Svislando. Same grave eksportartiklo estas la sekigita cepo, da kiu ni eksportis pasintjare 200 vagonojn al FRG, kaj Japanio.

panoramo

La hungaran delegitaron, partoprenantan en Meksikurbo la 16. plenkunsidon de la Internacia Atomenergia Agentejo, gvidis akademiano d-ro György *Osztrovszki,* la prezidanto de la Hungara Atomenergia Komitato. Post sia hejmenveno li informis, ke la plenkunsido pridiskutis kaj akceptis la programon por la jaroj 1973—78. Tiujn planojn karakterizas precipe la pligrandigo de la nombro de la atomenergiejoj. Ĝis 1978 la suma kapacito de la atomenergiejoj de la mondo plialtiĝos de la nuna 27 mil megavattoj al 190 mil megavattoj, do al sia sepoblo, kaj ĝis 2000 al sia 110-oblo, sume al 3 milionoj da megavattoj. La industria, agrikultura, biologia kaj medicina aplikoj de la nukleara tekniko estos ankaŭ plu elstare gravaj eroj en la programo de la agentejo. Cetere en la 16a plenkunsido oni elektis d-ron György Osztrovszki vicprezidanto de la teknika kaj budĝeta komitato de la programo.

— o —

En la dua duono de la pasinta jaro oni okazigis multe da internaciaj kongresoj kaj kunvenoj. Duonmilo de fakuloj el dudek landoj diskutis pri la eblecoj de la senakcidenta amastrafiko. La fakuloj de ses socialismaj landoj esploris la problemojn de la defendado kontraŭ la malpuriĝo de la aero. La scienca teknika konsilantaro n-ro 4. de la karboekspluata komitato ĉe la Konsilio de lą Ekonomia Interhelpado de la socialismaj landoj kunsidis por pritrakti la aktualajn prisekurecajn kaj prihigienajn demandojn koncerne la ŝirmadon de la laboruloj. La Eŭropaj citologiaj societoj aranĝis sian 2-an kongreson kun kvarcent partoprenantoj en la domo de la Hungara Scienca. Akademio.

— o —

En Munkeno fondiĝis la hungara sekcio de la orienta ekonomia komitato de la Germana Federacia Respubliko. La sekcio rigardas sia tasko akceli la pliintensigon de la ekonomiaj interrilatoj inter G.F.R. kaj Hungario kaj la disvolvon de la pluaj formoj de la teknika-ekonomia kunlaboro. En la proksima estonteco fondiĝos ankaŭ en Hungarlando la ekvivalento de la okcidentgermana subkomitato, la G.F.R.-sekcio de la Hungara Komerca Ĉambro.

— o —

La rumana eldonejo Kriterion en Bukareŝto, aperiganta en Rumanio la plej multe da hungarlingvaj libroj, festis grandan okazaĵon: en la libroserio „Horizont" antaŭ nelonge aperis ĝia centa libro. La jubilea libro estas la dekkvina (post la liberiĝo la sepa) hungarlingva eldono de la romano *Kampuloj,* la verko de la mondfama, Nobel-premia pola verkisto, Wladyslaw Stanislaw Reymont.

— o —

En 1952 la hungaraj fakspertaj ĉevalbredistoj komencis la fakscian elformadon de la enlanda baza breditaro de la mondfamaj jungĉevaloj, originantaj el Lipica, apud Triesto. La enlandan etaton, kiu restis post 1945, oni transloĝigis al la ĉevalbredejo de Csipkéskút, situanta en pli natura ĉirkaŭaĵo, sur la altebeno de la montaro Bükk. El la kvar plej grandaj lipicaj breditaroj de la mondo la hungara etato estas la plej bona. Niajn lipicajn ĉavelojn oni eksportas en nombrajn fremdajn landojn, jare en valoro de pli ol du milionoj da forintoj.

panoramo

La mondfama bazbreditaro, jubilanta la 20-an jaron de sia ekzisto, estas inda reprezentanto de la hungara ĉevalbredado.

— o —

La prezento de la grandega soveta aeroplano de tipo TU—144, kiun oni projektis helpe de la profitigo de la plej modernaj sciencaj rezultoj kaj mezuradoj, estis sensacio en la Pariza kaj poste en la Hanovera flugmaŝin-ekspozicio. Poste ĝi prezentis sin en Varsovio, Prago, Sofio kaj ankaŭ en Budapeŝto. La supersona pasaĝerlivera aeroplano de tipo TU—144 flugas kun la duoblo de la sonrapideco, hore po 2500 km-ojn, kun 110 pasaĝeroj en sia interno. La maŝino prezentita en Budapeŝto estis la prototipo de la tipo TU—144, sed jam estas pretaj ankaŭ la unuaj serie produktitaj ekzempleroj. Jam viglan interesiĝon ĝi vekis en Japanio, Sud-Ameriko kaj en pluraj landoj de Eŭropo.

— o —

En 1972 la hungara vineksporto atingis rekordan rezulton: ni liveris, 1,3 milionojn da hektolitroj da vino al eksterlando; preskaŭ la 20%-on de tiu kvanto al okcidentaj landoj.

— o —

En la ok unuaj monatoj de 1972 venis preskaŭ kvin milionoj da eksterlandanoj al Hungarlando, el 125 landoj, 300 milojn pli ol en la pasinta jaro ĝis la 1-a de septembro. Ankaŭ la nombro de la hungaroj partoprenintaj eksterlandan vojaĝon kreskis: ĝis la 1-a de septembro 200 milojn pli multaj — preskaŭ unu miliono — vizitis la landojn de Eŭropo kaj aliaj kontinentoj.

— o —

La III-a Internacia Esperanto-Feriado ĉe Balta Maro okazos en Miedzyzdroje de la 17—18. 06. 1973 j. Informojn petu ĉe: GROMADA, 70—414 Szczecin, Pl. Lotnikow 7, Pollando.

— o —

La Balaton-regionaj kurac-banejoj estas tutmonde famaj. En la kurac-banejo de Hévíz estas sanigataj jare pluraj miloj da malsanuloj.



Nia foto: Hévíz, kuraco per ŝlimo.

panoramo

La „Metro" de Budapeŝto jam trafikas sub Danubo

Je la centjara jubileo de Budapeŝto, agrabla kaj valora donaco estis, ke ekfunkciis la orienta-okcidenta linio de la subtera fervojo, t.n. „Metro". Nova veturlinio do interkroĉas Peŝton kun Buda, kaj ĝi kondukas tra sub Danubo.

La konstruo ne estis sen malfacilaĵoj, precipe en la sablaj kaj ŝlimaj aluvioj, sed oni sukcesis venki la obstaklojn kaj nun jam estas preta la tuta linio pli ol 10 kilometrojn longa kun 11 stacioj. Sur la linio trafikas trajnoj el 3, 4, aŭ 5, eĉ 6 ŝtalskeletaj kvaraksaj motorvagonoj, povantaj iri 70, maksimume 90 km-ojn hore. Ilia akceliĝo estas rapida: post la ekiro, kiam ili atingas la kajo-finon, ilia rapideco jam estas 50-km-a. La trajnoj sekvas unu la alian en 3-minutaj intervaloj.

La subtera fervojo estas provizita per la plej modernaj instalaĵoj por certigi la necesan rapidecon, sekurecon, aerumadon, lumigadon: agrablan veturadon por la pasaĝeroj. Ankaŭ pri la estetika aspekto de la stacio-kajoj oni zorgis. La veturlinio kondukas en tunelo konsistanta el du grandaj tuboj. Tiun tuboformon, ne agrablan al la okuloj, oni aliigis ĉe la staciaj haloj kaj kajoj: tie la pasaĝer-halo kaj la kajoj en la tuneltubo kune formas grandan halon, en kiu fortikaj kolonoj tenas la volbojn. La muroj kaj la plankoj de la stacioj estas kovritaj per facile purigebla forta materio (granito, marmoro, mozaikoj), la „plafonon" oni formis per aluminio-lamenoj kaj moderna lumigado. La muroj de la stacio-kajoj kaj haloj havas ĉiustacie alian koloron, tiel ke la pasaĝeroj povas orientiĝi ne nur laŭ surskriboj kaj la diversa formo de la kolonoj, sed ankaŭ laŭ la koloro de la stacio.

De la supra antaŭhalo ĝis la malsupra stacio-halo ruliĝantaj ŝtuparoj funkcias en oblikvaj tuneloj. Ili, movataj per apartaj maŝinoj, povas transporti 8000 homojn hore.

La bonege aerumitaj subteraj ejoj estas purigataj en la nokta paŭzo per forta akvoŝprucigado.

La pasaĝeroj ofte interesiĝas pri tio, kiel oni faris la konstruadon, precipe sub Danubo. En tiu sekcio, en proksimume 35-metra profundo, borilŝildoj laboris en la argilo. El la sub-Danubaj tuneloj oni ellevis pli ol 22 mil kubmetrojn da argila teraĵo. Inter la du malsamdirektaj tuneloj la distanco estas 20 metroj, kaj super ili, ĝis la plej firma bazo de la Danub-kuŝejo troviĝas minimume 8 metroj da tertavolo.

Ĝenerale la tuneloj estis konstruatai el la kutimaj grandaj ferfandaĵaj elementoj, t.n. *tubingoj*, kiujn oni kunmetas per ŝraŭboj. Sed ofte oni konstruis la tunelojn ankaŭ el artikaj ferbeton-elementoj. En la tuneltuboj oni ofte devis labori kun metodo de pli granda aerpremo, kaj oni laboris samtempe en du paralelaj tuneltuboj.

Niaj laborantoj multe profitis el la riĉaj spertoj, kiujn al ili komunikis la fakuloj de la Metro-konstruantoj de Moskvo. Ankaŭ la belaj trajn-veturiloj estas importitaj el Sovetunio.

Ĉiuokaze ni devas estime kaj kore saluti la konstruintojn, laboristojn de nia subtera fervojo, dezirante al ili sanon, forton, pluajn sukcesojn. Ni certe esperas, ke same bonrezulte ili sukcesos ankaŭ pri la norda-suda linio jam konstruata.

Dro István Bácskai

Kvincent hungaraj fakuloj en 46 landoj de tri kontinentoj

La TESCO Internacia Teknika-Scienca Kunlabora Oficejo prizorgas multspecajn taskojn: ĝia agado etendiĝas al la eksporto de la produktaĵoj de la inĝeniera kaj spirita laboro, al la teknikascienca kunlaboro, kaj al la organizado kaj plenumado de la eksterlanda laborado de la fakuloj.

Nuntempe rondcifere 500 hungaraj fakuloj laboras en 46 landoj de *Afriko, Azio* kaj *Latin-Ameriko.* La plej granda projekta laborado estas nun farata en *Germana Demokratia Respubliko:* hungaraj inĝenieroj faras la studprojekton de la Metro en Dresden, la elformadon de la publikaj konstruaĵoj de la urbocentro en Magdeburg, plu en distrikto de Cottbus la elformadon de nova urbocentro kaj loĝejcentro, la planlaborojn de grandmagazenoj, hospitaloj, sanitaraj institucioj kaj pluraj industriaj granduzinoj.

Laŭ komisio de la *Unuiĝinta Araba Respubliko* ni faras la planojn de la kluzoj konstruotaj sur la navigeblaj kanaloj de Nilo. *Irako* petis la studplanojn de evoluigo de granduzino agrikultura kun 4000 hektaroj. En *Nigerio* hungaraj inĝenieroj faras la ordigajn planojn de du grandurboj kaj la projektadon de 60-mejla ŝoseo. Laŭ komisio de la *Ginea* registaro pretiĝas studo por plibonigo de la medikament-provizado de la lando. La registaro de la Respubliko *Jemen* mendis akvoaferan studon, la registaro de *Irano* petis la hungarajn fakulojn pere de TESCO por evoluigo de la vinberproduktado, la ŝtato *Mysore en Hindio* por pretigo de agrikultura kaj nutraĵindustria studo.

Fakinstruado de eksterlandaj teknikistoj en Hungario

En la pasintjara aŭtuno estis inaŭgurita en Budapeŝto la Hejmo de Eksterlandaj Teknikistoj — en kunagado de la TESCO Internacia Teknika-Scienca Kunlabora Oficejo).

Jam de dek jaroj Hungario donas larĝajn eblojn al la gejunuloj de la evoluantaj landoj por la faka lernado, por la plueduko. Ties celo estas: doni helpon al tiuj landoj liberiĝintaj el kolonia aŭ duonkolonia sorto, kiuj ankaŭ sur tereno de la nacia fakinstruado faras fortostreĉojn por sia leviĝo. En la pasinta periodo lernis kaj akiris diplomon en Hungario rondcifere 2200 ŝtatanoj el la evoluantaj landoj. Komence tiuj ĉi studentgrupoj konsistis el 30—40 personoj. La nombro kreskis de jaro al jaro, kaj en la lastaj jaroj jam 700—800 stipendiuloj ricevis fakan instruon en Hungario en organizado de TESCO. Hodiaŭ jam gejunuloj de 50 landoj lernas ĉe ni, parte laŭ la teknika-scienca interkonsento inter la koncernaj registaroj, parte laŭ invito de diversaj sociaj organizaĵoj. La fakinstruado okazas en 90 fakteritorioj. La faklaboristaj-teknikistaj lernantoj lernas ĉe ni dum tri kvar jaroj, la studentoj kun universitata kvalifiko, pretendantaj la perfektigon, lernas ĉe ni dum 6—24 monatoj. La stipendion ili ricevas pere de TESCO, kaj tio estas monate 1500—2000 forintoj. Pluraj gejunuloj ĝuas la stipendion de Unuiĝintaj Nacioj.

NOVA JARO – NOVA SORTIMENTO

AĈETU EN LA
LOĜEJ – ESTABLA
VENDEJO

DOMUS

KUN RIĈA SORTIMENTO DE
MEBLOJ ENLANDAJ KAJ IMPORTITAJ
LUMIGO-KORPOJ LOĜEJAJ TEKSAĴOJ
NI ATENDAS NIAJN KARAJN AĈETANTOJN

BUDAPEŜTO XV. SIPOS DÉNES U. 9-11



MALFERMITA:

LABORTAGE INTER
LA 10-a KAJ 18-a

SABATE INTER
LA 10-a KAJ 15-a

ALIREBLA PER LA
AŬTOBUS-LINIOJ
N-RO 25 KAJ 70

AMIKAJ KONTAKTOJ INTER LA HUNGARAJ KAJ EKSTERLANDAJ TEATROJ

La teatro okupas gravan lokon en la naciaj kulturoj. Eble la filmo pli rapide nin sciigas pri la alilanda arto, sed ĝi ne donas travivaĵon de intima kontakto inter aktoroj kaj rigardantoj. Interese estas, ke malgraŭ la lingvaj malfacilaĵoj (manko de sinkronizeblo) la bona ludo havas grandan forton altiran.

La hungaraj teatroj faras ĉion por resti en la kultura sangcirkulado de la mondo. Kutime en oktobro estas la artaj semajnoj en Budapeŝto, sed krome preskaŭ ĉiam ni havas ankaŭ alitempe gastojn: muzikistojn, kantistojn, aktorojn, teatrajn ensemblojn. En ĉiuj ĉi gast-roladoj troviĝas novaĵoj: kiel ili sentigas al ni speciale la propran verkiston aŭ propran popolon; kion novan la reĝisoro povas prezenti; kiel li povas montri tiajn trajtojn de la verko, kiujn ni ankoraŭ ne rimarkis. Ne lastvice estas interesa ankaŭ la dekoracio, substrekanta la imagojn de la reĝisoro.

Pri ĉio ĉi mi interparolis kun *Tamás Major*, elstara aktoro kaj reĝisoro de la hungara Nacia Teatro, nelacigebla adepto de la paca kultura kunlaboro de la popoloj. Ĉi tiu artikolo multe profitis el liaj informoj; ĉi tie mi citu liajn finajn vortojn pri amikeco: „Ne estus bone kopii la laboron unu de la alia: ni neniam dezirus tion. Sed estas grandioze senti, kiel evoluas la artistoj de la mondo, kiel ili klopodas, laboras por unu celo diversmetode."

T. Major, el nura memoro, sen iaj ajn notoj, povis paroli horon longe pri la eksterlandaj amikoj de sia teatro. El la longa-longa listo, de li ricevita, mi povas prezenti nur partojn; unue tiujn, kiuj koncernas la amikecon inter la teatroj.

Por nia Nacia Teatro multe signifis la amikeco kun la sovetaj teatroj. En 1945, kiam ĝi komenciĝis, ankoraŭ vivis la granda generacio kreinta la novan socialisman teatroludon laŭ la metodo de *Stanislavskij*. Precipe la grandiozaj geaktoroj *Moskvin* kaj *Tarasova* helpis multe en la renovigo de la hungara arto teatra. La amikecon inter nia Nacia Teatro kaj la Arta Teatro de Moskvo kaj Leningrado fortigis la ĉiujaraj reciprokaj vizitadoj. Simila amikeco estiĝis inter la budapeŝta Operdomo kaj la mondfama Granda Teatro en Moskvo. Krom reciproka gast-rolado de gekantistoj kaj muzikestroj, okazis reciproka gastado ankaŭ de tutaj baletensembloj. — Multe signifis por ni la amikeco kun la elstaraj artistoj de Germana Demokratia Respubliko. Ni povis ĝui ilian kapablon plej bone interpreti dramojn de Bertold Brecht. — Estas menciinda la plej juna kaj moderna teatro: la Dudek-kvina Teatro en Budapeŝto, ludinta grandsukcese en Helsinki kaj Beogrado. — La regionaj teatroj ofte ligas amikecon senpere kun la najbarlandaj teatroj: la teatro de *Pécs* kun la jugoslavaj, *Győr* kun *Bratislava*, *Miskolc* kun *Cluj* ktp. Ĉe la reciprokaj vizitoj estiĝas intimaj, fidelaj amikecoj inter aktoroj kaj reĝisoroj: ili interŝanĝas privatajn pensojn pri la arto kaj eĉ pri la propra vivo. *Helena Weigel*, la fama germana aktorino-reĝisorino ofte skribis en gazetoj pri la hungara teatro kaj serĉis informojn pri niaj geaktoroj.

Koncerne la direkton de la interesiĝo, antaŭ ĉio estis ekscite vidi, kiel ludas la gastoj-teatroj siajn proprajn grandajn naciajn dramojn. Granda travivaĵo estis vidi dramojn de *Gogol*, *Ĉeĥov*, *Gorkij*, prezentatajn de sovetaj ensembloj. La figuroj de „Mortaj animoj" de *Gogol*, viditaj antaŭ kelkaj jaroj, tiel vive elpasintaj el la libro de Gogol, ĝis nun kvazaŭ staras antaŭ mi. Simila travivaĵo estis la ĉarma naiva misteria ludo de Nacia Teatro el *Varsovio*. Malgraŭ la naiva ludo, ni ĉiuj vere travivis la fabelon pri Jozefo: tiel simple povas ludi nur plej bonaj geaktoroj. Mia persona travivaĵo estis ankaŭ „Nathan la Saĝa" de *Lessing* en la prezentado de *Deutsches Theater;* precipe la ĉefrolanto *Wolfgang Heinz* eminentis kreante majstre la karakteron de vere vivanta Nathan. Simile neforgeseble estis vidi dramojn de *Karel Čapek*, prezentatajn de Prahaanoj. Ili ĉiam kunportas interesaĵojn en la dekoracio, kaj iajn modernaĵojn en la koncepto. Kaj mi ne forgesu pri la jugoslavoj: la grandiozan reĝisoradon de *Bojan Štupica* kaj la aktorinan majstraĵon de *Mira Štupica* en la dramo „Dundo Maroje".

Nia nacia teatro, siavice, prezentis de *Imre Madách* la dramon „La tragedio de l'homo" en Sovetunio, Pollando, Ĉeĥoslovakio kaj GDR; en aliaj landoj la teatrajn muzikverkojn de *B. Bartók*, *Z. Kodály* kaj *I. Szokolay*. Fakte, kelkaj el ĉi tiuj verkoj jam estas mondkonataj, tamen la hungara prezentado vekis viglan interesiĝon.

De kelkaj jaroj ekzistas ankaŭ strebado inversa al la menciitaj: la teatraj ensembloj, kvazaŭ por montri siajn fortojn, prezentas naciajn dramojn de aliaj landoj en tiuj landoj. Hungara ensemblo, kun la reĝisorado de *K. Kazimir* prezentis scenejan version de la finna epopeo „Kalevala" en Helsinki, kaj la eĥo en la finnaj gazetoj ŝajnas montri, ke ĉi tiu aŭdacaĵo estis sukcesa. En Sovetunio varme oni akceptis la prezentadon de „Varsovia melodio" kun la rolado de *Mari Törőcsik*.

Ni jam raportis pri la prezentado de „La tragedio de la homo" fare de *estonaj* aktor-artistoj. La hungaraj fakuloj trovis, ke la prezentado en kelkaj detaloj montris interesajn solvojn. Krome impresis tre agrable, ke niaj parencoj-gastoj ludis la teatraĵon al ni karan el la tuta koro.

Pro spacmanko mi devas ĉesigi pluan ĉerpadon el la riĉa materialo. Rilate al la futuro ni povas esti optimismaj pri la plua daŭro kaj plifortiĝo de kultura amikeco inter la teatroj. La ŝtato helpas kaj la aktor-ensembloj kore deziras tion.

Gabriella Ősz

LAJOS SZALAY

La majstro de la vivanta desegno hungara naskiĝis en 1919 en Ormező, en kamparana medio. Tie li lernis konversacii kun la naturo; liajn observaĵojn ankaŭ poste, dum lia tramonda irado, determinas liaj memoroj pri la kamparo, bestoj, vilaĝo. Liaj proprecoj estas ligitaj al epoko kaj tamen sentempaj, kiel ankaŭ la alia temo de liaj desegnoj: la batalo kontraŭ la perforto. Ĉar en ĉi tiu grandatalenta kamparanido la epoko densiĝis kun tia forto, ke li povis krei propran stilon, memstaran artospecon de desegnado.

Oni frue rekonis lian talenton kaj alvokiĝon. Li estas la unua el siaj samtempuloj, kies desegnaĵoj aperis en volumoj kaj akiris por si ankaŭ la senlimajn eblajojn, rangon kaj universalecon de artobranĉo.

En 1945, post la liberiĝo, li iras eksterlanden kun stipendio. Post mallonga restado en Parizo, li loksidiĝas en Argentino, poste, en 1960, en New York. La multo de aprecaj artikoloj, la rango de plej bona desegnisto, la universitata katedro en Tucuman kaj Buenos Aires, eldonaĵoj kaj ekspozicioj ne povas lin kontentigi, ĉar lin interesas „la batalo mem"; ĉi tiu vokas vivi liajn novajn desegnoseriojn.

La plej belaj plej kompletaj desegnoj pretiĝis en la fino de la sesdekaj jaroj: kvazaŭ sian sopiron je harmonio li volus validigi en la densa tekniko de la strekado. La monda sukceso de la libro „Genezo" estas pravigo de la artisto krianta sian solecon en la mondon.

La evoluo de lia arto estas senrompa. Oni lin menciadas kiel la sorĉiston, majstron, magon de la desegnoplumo, kreinton de la hungara libera grafiko.

De unu jaro li laboras en Parizo. Post lia lasta prezentiĝo en Hungarlando apenaŭ estas imageble, ke oni ne faru ĝisfundan korektadon en la historio de la hungara desegno-arto rekonante la patrujan kaj universalan rangon de Lajos Szalay.

D-ino Zsuzsa D. Fehér

(Lajos Szalay, tempe de sia pasintjara ekspozicio, pasigis hejme kelkajn monatojn kaj tiam maturiĝis en li la decidiĝo reveni en Hungarlandon. Ni esperas, ke li efektivigos sian intencon. *Red.*)



ADAMO KAJ EVA, 1968.

MILITO, 1971.

IMRE UNGÁR
(1909-1972)

La hungara muzika mondo kaj la hungara esperantistaro funebras. La 22-an de novembro 1972 forpasis Imre Ungár, la konata fortepian-artisto, profesoro de la Muzika Altlernejo Hungara, — malnova, ĝis la vivofino fidela, aktiva esperantisto.

Li naskiĝis la 23-an de januaro 1909 en Budapeŝto, estis tri-jara, kiam li blindiĝis. Tiel, apenaŭ perceptanta ion el la lin ĉirkaŭanta mondo, li tamen trovis la belon en la fe-mondo de la muziko, kaj baldaŭ ankaŭ la noblon de la vivo en Esperanto.

La bazajn konojn necesajn por pli profunda kompreno de la ekstera fizika mondo, vivo kaj la interno de la animo, li ricevis en la lernejoj diversgradaj de la Blindula Instituto.

La interesiĝo pri muziko kaj lia talento frue sin montris, kaj malgraŭ la blindeco li fervore studis pianoludon. Esperanton li eklernis en sia 12-a jaro kune kun la poste famiĝinta Nikolao Bánó, konata gvidanto de la blindula Esperanto-movado.

Ungár estis nur 15-jarulo, kiam li jam faris koncertvojaĝon en Hungario kaj eksterlande. Dudek-jara li akiris en la Budapeŝta Muzikakademio artistan diplomon kun kvalifiko „eminenta".

En 1926 li partoprenis la konkurson de junaj talentoj de Ĉefurbo Budapeŝto kaj ricevis la unuan premion. Simile la unuan premion li ricevis en la internacia Chopin-konkurso en Varsovio en 1932.

Estas menciinde, ke Esperanto ebligis al li partopreni tiun altkvalitan konkurson de fortepianistoj. Ne havante materialan eblecon, ke lin — la blindan artiston — iu akompanu al eksterlanda vojaĝo, li petis helpon de polaj esperantistoj. Jam ĉe la hungara limo Ĉeĥoslovakia transprenis lin esperantistoj kaj simile ĉe la pola limo. Esperantistoj zorgis pri li ankaŭ en Varŝovio dum la artisto-konkursoj, kaj kiam li ricevis la unuan premion, tre honorigan ja por artisto kiu neniam vidis muziknotojn kaj fortepian-klavaron — dum lia Eŭropa koncertvojaĝo ĉie helpis lin esperantistoj.

En 1935 li koncertadis en Ameriko. La dua mondmilito lin trovis en Nederlando kie li vivis inter 1939—1943, tiam li revojaĝis en Hungarion, sed nur post 1945 li povis denove aperi antaŭ koncertpubliko en sia patrio kaj en Eŭropo. En 1949 li iĝis profesoro en artisto-fako pri fortepianludo en la Budapeŝta Muzika Altlernejo (antaŭa Muzikakademio).

Imre Ungár ĉiam volonte akceptis invitojn al esperantaj artaj kaj kulturaj vesperoj. Memorinda estis lia kontribuo al la alta nivelo de la Somera Universitato de la 51-a Universala Kongreso de Esperanto en Budapeŝto, kie li prelegis pri „Béla Bartók kaj la hungara popolmuziko", kun tre granda sukceso ilustrante sian prelegon per viva muziko. Memorinda estis ankaŭ lia prelego en la Somera Universitato en Gyula, kaj liaj koncertoj en la Zamenhof-memorfestoj. Ankaŭ en la ĉijara Zamenhof-vespero li promesis paroli kaj ludi... sed la sorto devigis lin je longa paŭzo, — kiun vivigas jam nur la rememoro pri lia ĝojdona arto.

En la nekrologo de la Muzika Altlernejo ni legas:

„Lian art-poetikon karakterizis la humilo al la arto kaj la profunda humanismo originanta el lia nobla animo. Li oferis sian tutan vivon por la plena evoluigo de sia arto kaj al la edukado de junaj pian-artistoj. Lia memo, radianta simplecon kaj sinceron, lia vasta klero kunligiĝis kun tre klara kaj ĝenerala interna vido. Ni perdis sinceran amikon, amatan kolegon" kaj ni aldonas: samideanon en la plej nobla senco de la vorto.

Alfonso Pechán

NIA SEMINARIO APUD BALATONO

Ĉu vi estas melankolia, kara leganto, ĉar nia Esperanto ne evoluas rapidege, kiel la plej nova soveta aviadilo, kiu kun doublo de la sonrapideco dum 45 minutoj flugegas de Moskvo al Budapeŝto?

Espereble vian koron ne mordis la vermoj de la pesimismo, do atentu bone: 1. Kiel firme evoluadas nia Hungara Vivo, superante ankaŭ multegajn nacilingvajn revuojn! — 2. Esperanto eniris jam en niajn lernejojn, ankaŭ en la Filologian Fakultaton de la Budapeŝta Universitato, kie Esperanton instruas, prelegas adjunkto kaj kvar komisiitaj prelegantoj. — 3. La eldonnombro de niaj lernolibroj kaj vortaroj estas mezurebla nur per dekmiloj. — 4. De dek jaroj tute laŭ institucia maniero laboras nia SEU en Gyula. — 5. Ni ĝuas la moralan kaj materialan subtenon de niaj sindikatoj. — 6. Kaj en komuna aranĝado de la Fervojista Sindikato kaj HEA jam dekkvar fojojn ni havis seminariojn apud la belega lago Balatono, unue en Lelle, poste en Kenese, kaj nun — de la 12a ĝis la 17a de septembro — denove en Zánka. Sesdek du esperantistoj ĉeestis tute senpage, kaj ĉiu povis plilarĝigi sian klerecon en multaj rilatoj.

El la dek unu prelegoj ni ellevas la plej gravajn:

En la 70aj jaroj de nia jarcento kulturita persono ne povas vivadi sen ĝusta informado pri la internacia politiko. Temas ja pri morto aŭ vivado de la homaro! K-do Endre Zádor, ministeria konsilisto prezentis simpatie i.a., ke ni tute ne intencas disvastigi niajn ideojn per militaj rimedoj. Li klarigis la nunan staton de la vjetnamia agresado far Usono, la situacion en la proksima oriento, la signojn por la paca disvolviĝo, precipe en Eŭropo.

György Vundele, gvidanto de la ekonomia sekcio de SZOT pritraktis la rolon de la sindikatoj en la hungara ekonomia politiko. Li emfazis, ke la sindikatoj klopodas por egalmezura plialtiĝo de la vivnivelo. Li urĝis, ke Esperanton oni portu pli proksimen al la uzinoj, kaj emfazis ankaŭ tion, ke la Esperanto-aktivuloj okupu indan lokon en la gvidaj korporacioj de la entreprenoj. Li rekonis ankaŭ la utilan konsci-formadan rolon de Esperanto.

Nia prezidanto d-ro Jozefo Mátéffy denove pruvis, kiel oni parolu interese pri ŝajne ne tro interesa temo, pri la statuto de HEA. Ĝoje ni salutis la pli favoran partoprenon de virinoj en la prelegoj: Ada Csiszár, Eva Farkas, Elizabeta Pallós kaj Maria Rózsa Szabó, kaj de junuloj Tibor Vaskó kaj Sándor Jakab.

Ankaŭ du eminentaj membroj de la fervojista movado faris sian kutiman devon. Szilárd Bálint portis sur siaj ŝultroj la devojn de la seminarioestro, d-ro István Bácskai parolis pri la MEM-movado, kaj ankaŭ resumis ĉe la fino la laboron de la Seminario.

L. Kökény

MESAĜO AL VJETNAMIO

Al k-do MA—HÔNG—SON
Domnumero: Dôi 12. Kolĥozo: Nongtruong „LAM—SON" Distrikto: Ngoc—Lac. Urbo: THANH—HOA. Norda Vietnamio.

Kara Amiko!

Akurate antaŭe dek jaroj la 6-an de februaro en 1963, vi skribis leteron al mi pri vi mem. Tiam vi estis 34-jara, nun vi aĝas 44. Vi naskiĝis sude, en la vilaĝo PHU—MY. En 1954, post la konvencio de Ĝenevo, laŭ la alvoko de la Partio vi iris norden. Kiam vi estis 19-jara vi soldatiĝis al Popolvjetnamia Demokrata Respubliko. Vi deĵoris kiel soldato dum 12 jaroj, ĝis 1960.

Dume sude la Usonaj imperialistoj kun Nĝo—Linh—Diêm verŝis la sangon, turmentis la senkulpajn homojn.

Dum tiu tempo vi ne vidis vian familion kaj tute ne konis viajn gefratojn, kiuj intertempe naskiĝis. Kiel vi skribis, vi ne ricevis sciigon pri via familio kaj ne havis kuraĝon por sendi leteron al via familio, ĉar sude la malamikoj tiam konfiskas la malgrandajn bienojn, faras venĝan pafon, detruas la domon.

En 1963 estis relative trankvila periodo. Oni eksigis vin el armeo kaj la Partio sendis vin al la konstruado de socialista ekonomio. Vi laboris, kiel agrokultura laboristo ĉe la ŝtata farmobieno LAM—SON, kie vi kulturis diversajn industriajn arbojn kaj vi estis kontenta.

En 1956 oni fondis la Vjetnaman Pacdefendan Esperantistan Asocion en Hanoi kaj vi komencis lerni Esperanton. Vi kun granda intereso legis la gazetojn: Nuntempa Bulgario kaj Hungara Vivo.

Leteroj iris tien kaj reen. La lastan leteron mi ricevis ĉe la fino de 1963, vi skribis, ke vi nun ĉesigas la korespondadon pro diversaj kaŭzoj, sed vi esperas, ke post iom da tempo alvenos la paco kaj vi denove anonciĝos . . .

Do, mia kara Amiko, tiu mallonga tempo kontinuis dum dek teruraj jaroj.

Nun, kiam mi skribas ĉi tiun mesaĝon, jam estas surskribita la interkonsento pri la paco en Vjetnamio. Ni hungaroj estas feliĉaj, ke ni povas partopreni en la laboro de la internacia kontrola kaj inspektora komitato.

La armeo de Usono unu el la plej granda potencoj de la mondo, ne povis venki per soldata forto super la heroa Vietnama popolo. Ŝi estis devigita politike pritrakti.

Kune kun la milionoj de progresemaj homoj de la mondo, ankaŭ ni hungaroj laŭ nia forto helpis vian belan landon, kara amiko Ma Hong Son. Kiam la kara homa sango fluis en via lando, nian propran sangon ni sendis al vi, kiam la senkulpaj sučinfanoj, virinoj, kaj maljunuloj iĝis kriplaj, ni sendis ankaŭ kuracistojn, hospitalon kaj medikamentojn. Bedaŭrinde la inside mortigitajn homojn ni ne povas revivigi, sed vivas en ni vera kunsento kaj homa helpanta volo por vi.

Kara Ma Hong Son, mi ne scias ĉu vi ankoraŭ vivas, aŭ ne?... Sed ni estas certaj, ke en via lando ankoraŭ vivas milionoj de similaj homoj kiel vi kaj ni promesas, ke kun la sento de frata solidareco ni deziras helpi vin plu en la cikatrigo de la vundoj kaj en la rekonstruo de via bela lando!

Dezirante forton kaj sanon, mi petas vin, bonvolu sendi vivsignon; Via sincera hungara amiko:

SZILÁRD BÁLINT

Gasta pago

Eli Urbanová, instruistino, ĉeĥino, naskiĝis en 1922. Esperantisto de la jaro 1948. Aŭtorino de multaj originalaj versoj, gajnis plurajn konkursojn. Ŝian poemaron *Nur tri kolorojn* eldonis Stafeto en 1960. Ŝiaj poemoj ne estas multpretendaj: prikantas la momentajn ĝojojn kaj tristojn de la vivo, precipe de la amo. La muzikeco estas unu el la ĉefaj virtoj de ŝia poezio: multaj poemoj fluas kvazaŭ kun kanzona facilo. Ŝian fruan poezion karakterizis nekutima aŭdaco en la ampoemoj: la ĉi-subaj pecoj montras certan sobriĝon tiuterene. Eli Urbanová apartenas nepre al tiuj poetoj, kiuj meritas nian atenton.

(V. B.)

Eli Urbanová:

Renkonti vin...

Renkonti vin en
arbareg' profunda!

Sovaĝaĵ, sukaj
herboj tie kreskas
kaj raraj floroj,
pezaj pro mielo . . .
Aĥ, vin renkonti
meze de la belo,
kiu nuptante
tamen virga restas!

Nin fermus arboj . . .
De odora brančo
pean' de birdoj
super ni sin portus . . .
Renkonti vin kaj
kio estis, mortus,
kaj ni fariĝus
fiančin', fianĉo . . .

Renkonti vin . . . Mi
ekvilibron trovu!
Jes, tro kuraĝe
mi, edzino, revas!
Mi pentas . . . Jen! Vi
la okulojn levas
rekte al mi, por
ke mi legi povu:

Renkonti vin en
arbareg' profunda!

Lajos Tárkony

REVUO DE REVUOJ

La vigla HEROLDO DE ESPERANTO raportas pri interesaĵoj en kaj ĉirkaŭ la Portlanda U.K., intervjuas tieajn aktivulojn, gesinjorojn *Schulze*. Ĉi tiuj faras bonan prognozon por E-o en Usono, precipe pro la turismo, per kiu miloj da usonanoj, flugantaj ĉiujare eksterlanden, spertas konsterniĝante, ke ne ĉiu parolas angle. — Agrabla surprizo estas en ĉi tiu numero ree la suplementoj: scienca kaj literatura. En ĉi lasta ni menciu la Bocaccio-novelon el la Dekamerono en la traduko de *Waringhien*, impresan Protest-kanton el Kanado, tradukitan el la franca de *Julius Balbin*, kaj belan poemkolekton el la moderna estona poezio en plezuriga traduko de *Hilda Dresen*. En la scienca parto plej ekscita estas la informo de *M. T. Popov* pri la taĥionoj *(taĥys* greke = rapida), kiuj fajfas pri la ĝis nun ĝeneralvalida tezo, ke la lumrapido estas la rapidec-maksimumo. Entute iliaj proprecoj defias la t.n. „sanan homan menson". Se aparato povus el sia „tardiona" (sub-lumrapida) stato transformiĝi en taĥionan, ĝi povus atingi dum horoj la nebulozon Andromeda, kiu distancas de ni du milionojn da lumjaroj, kaj reaperi sur la tero en momento *pli frua* ol tiu, en kiu ĝi ekiris: sur taĥiona veturilo do oni povus senĝene vojaĝadi inter la galaksioj, eĉ vojaĝi en la tempo. Tio ŝajnas pravigi eĉ la plej aŭdacajn sciencfikciistojn. Bedaŭrinde, en la formulo de la taĥiona maso troviĝas negativa nombro sub kvadratradiko, do tiu maso estas imaginara. Ke ekzistas (aŭ povas ekzisti) tuta taĥiona mondo krom nia mondo tardiona, kaj ke tiuj du mondoj trapenetras sin reciproke, sed neniel interagas — ankaŭ tio liveros ideojn al la sciencfikciistoj. Tamen, la imaginareco de tiu taĥiona mondo suspektigas, ke ĝi estas ne pli ol matematika spekulacio, kaj restas tia, ĝis iu iel ajn sensebligos, detektos tian taĥionon. — El la aliaj, kosmologiaj, meteologiaj, genetikaj, farmakologiaj artikoloj precipe min impresis, ke la simioj montris sin tre inklinaj injekti al si per lerte farita aparato diversajn narkotilojn, tiom ke ili ripetis la injektadon, ĝis ili mortis. Erari do estas ne nur home sed ankaŭ simie.

La revuo LITERATURA FOIRO brave sin tenas, pasigante jam sian trian jaron, kaj elformante firman italan kunlaborantaron. En la lasta numero gaste raportas *W. Schumacher* (Hamburgo) pri seminario en GEJ, kiu okupiĝis pri kompara „blasfemistiko" baze de partoprenantoj el 9 lingvoj. Certe, ĉi tiu klopodo montras, ke E-o estas pli kaj pli uzata ne nur en solenaj, sed ankaŭ en maledifaj momentoj. Kaj estas vere, ke ĝislaste E-o pli taŭgis por laŭdo ol por mallaŭdo; tion montras ankaŭ ĉi lasta vorto mem, malpli drasteefekta kaj sentelvoka ol iu ajn etnalingva ekvivalento. Nu, tion oni povas interpreti ankaŭ tiel, ke E-o estas *pli nobla* ol la etnaj lingvoj, sed la junuloj ŝajne volas havi ankaŭ „porkecajn" elementojn, nuntempe tiel ŝate uzatajn en ilia etnalingva parolo. Ni vidos.

THE BRITISH ESPERANTIST enhavas la inaŭguran paroladon de la nova BEA-prezidanto *G. Leon-Smith;* lastatempe mi vere ne legis parolon pli optimismoplenan. Li mencias, ke la Brita Registaro aĉetis post la dua mondmilito la lingvon *Basic English* por 23 000 pundoj kun la papaga ripeto de la devizo „Jen estas la solvo". De tiam B. E. malaperis definitive. British Council elspezas jare pli ol dek milionojn da pundoj por venkigi la anglan lingvon en internacia uzado. Sed la E-movado povus disdoni premiojn al la irlanda *J. Lynch*, kiu en la komuna merkato insiste parolis gaele, al *Pompidou*, kiu neniam parolis angle, kaj precipe al ĉefministro *Heath*, kies televida klopodo paroli la francan vekis elkoran ridegon en Franclando kaj Belgio, kvankam li lernis france en la gimnazio dum kvar jaroj. Kiel ridinda devas do esti la franca parolo de tiu, kiu lernas la francan en dujara kurso? — Interesa estas la vidpunkto de *D. J. F. Dirke*, la konata kolerulo de la revuo. Laŭ li, la E-istoj ne devas peti humile kaj kaĵole favoron por si mem, ĉar ili jam estas privilegiuloj de la E-scio. Ili petu fiere kaj memkonscie por siaj malpli bonŝancaj fratoj, ne sciantaj E-on. Kaj en ĉi tiuj kompatindaj ili veku la senton de indigno pri tio, ke ili estas senigitaj de tiu privilegio. Ili postulu, ke al ili oni donu okazon akiri sian rajtan heredaĵon. Mi povas aldoni nur: Amen!

Pri multo mi devus ankoraŭ raporti, antaŭ ĉio pri la vere belega numero de PACO eldonita en GDR, kun multaj fortimpresaj artikoloj progresivaj kaj kun la tre interesa interlingvistika artikolo de *Detlev Blanke*. Ankaŭ OOMOTO meritus mencion, interalie pro la du lingvaj artikoloj el Urugvajo kaj Argentino, kiuj rifuzas la danĝeran, ĉar evoluo-baran „fundamentozon" de *Halbedl*. Sed mi ne havas plu spacon. Ĉu „kelka ĉeso ne estas forgeso"? Ni esperu.

ĈU VI VOJAĜAS?

ĈU VI EKSKURSAS?

NE FORGESU!



ĈIAM
ESTU ĈE VI
KONTRAŬTUSA
KURAC-SUKERO!

füszért

LA MERKATON METAS: BUDAPEŜTA GRANDKOMERCA ENTREPRENO DE SPICOJ KAJ DOLĈAĴOJ
BUDAPEŜTO, VII. DOHÁNY U. 40.

FACILAJ LEGAĴOJ

LA RECEPTO

Ĉi-aŭtune mia angla leteramiko skribis al mi, ke li vizitos nian landon kaj oficiale pasigos unu monaton en Hungario. Mi atendis lin en la flugstacio, sed iomete maltrankvile, ĉar mi neniam vidis lin alie ol nur sur eta fotografaĵo. Sed kiam mi ekrigardis altan, elegantan, sveltan sinjoron, kiu aspektis tute tiel, kiel mi imagis anglojn, mi lin aliris kaj bonvenigis. Mi pravis; vere estis li.

Post la ĝojplena renkontiĝo ni pasigis kune ankoraŭ multe da tempo tre amuza. Iufoje, promenante sur la monto Gellért, li haltis kaj rigardis ravite la sube etendiĝantan urbon.

— *Vidu, kiel belega ĝi estas!* — li montris kvazaŭ dommastro al gasto. (Tiam ankaŭ mi rigardis mian maljunan, kutiman urbon per novaj okuloj — *jes, ĝi estis vere bela!)*

— *Kaj la karaj, gastemaj homoj* li daŭrigis — *kaj tiuj delikataj manĝaĵoj!*

Mi sentis fierecon. Li longe laŭdegis la hungaran kuirarton, la fame bongustajn manĝaĵojn. Poste li demandis:

— *Sed kiel oni devas ĉi tie tiel multe manĝi? Ĉu tio estas popolkutimo? Mi neniam intencas grasiĝi, sed jen, mi jam havas ventron!*

— Nu, vi ne devas manĝi multe, se vi ne volas!

— *Jes, vi pravas, sed mi ne povas kontraŭstari, se oni regalas min... Kaj la hungaroj estas tre gastamaj! Ĉiuj, ĉiam nur manĝigas min per delikataĵoj. Tio estas vere tragedio*!

Ni preteriris ĝuste antaŭ restoracio. Rostita viando odoris invitante.

Ĉu vi sentas? — li demandis riproĉe, sed flaradis: — *Terure, kiel mi dezirus manĝi!* — Ni eniris la restoracion.

Post kelkaj tagoj li telefonis al mi per senforta voĉo.

— *Helpu, kara amikino, mi estas tre malsana!*

— *Kio okazis, kio vin doloras?*

— *Ho, mi havas kapdoloron, stomakdoloron, galkolikon... Ho, tiu kokidaĵo kun paprika saŭco!*

Mi komprenis cion. Rapide mi kunportis al li mian kuraciston.

— *Estos ĉio en perfekta ordo* — mi tradukis, kion la doktoro diris, transdoninte la recepton —, *se vi prenas el tiu medikamento tage sesfoje! Sed ĉiam nur post manĝado. Antaŭ prenado vi ĉiam devas manĝi, tio estas tre grava!*

— *Indulgon!* — ĝemis mia amiko tute pale. — *Mi certe mortos, se mi devas manĝi tage sesfoje! Pro tio mi malsaniĝis, ĉar mi ankaŭ ĝis nun manĝis multe, kaj ĉi tie oni ordonas per recepto ankaŭ manĝon?*

Ni klarigis al li ridante, ke ne estas necese manĝi kompletajn platojn. Suficos iomete da biskvito aŭ kornbulko, ke la medikamento ne estu prenata en malplenan stomakon. Mia amiko trankviliĝis. Li rapide resaniĝis kaj poste, leterskribante al mi el Britlando, jam ne rememoris pri la malsano, li menciis ĉiam nur la belajn tagojn, kiujn li pasigis en nia lando.

Iza Tarján

Tragikomedioj

Esence temas pri amaferoj malpli „sennube feliĉaj" ol konfliktaj. Ties „herooj" venis en kolizion unu kun la alia tiel akre ke tion ne kaŝis plu la muroj de la hejmo. Do, la historioj ne fontas el verkista fantazio, sed el tribunala proces-dosiero.

„DONU TUJ TRANĈILON!"

Helena J., dudekokjara eksedziniĝinta virino, konsumante en la drinkejo brandon, atendadis sian amindumanton, kiu longe malfruis. Por forpeli la enuon,, la virino interkoniĝis kun viro kaj en ties societo daŭrigis la trinkadon. Fine alvenis la atendita Stefano F., sed vidante, ke Helena ne estas sola, li ne proksimiĝis al ŝi. La virinon tio ege ĉikanis, tial ŝi faris laŭtan provokan rimarkon, sed la viro tiun preteratentis. Poste Helena J. — por veki ĵaluzon — interkisadis kun la nova partnero. Sed ĉiu ŝia klopodo estis vana. Stefano. F. ankaŭ nun ne reagis, kaj indiferente akceptis eĉ la bieron, per kiu la virino lin surverŝis. Tiom da flegmo plenigis la virinon per senbrida furiozo. De la najbara tablosocieto ŝi pruntepreneis poŝtranĉilon kaj alirinte al Stefano F., senvorte ŝi pikis ĝin en ties dorson.

La viro suferis la gravan vundon, tamen la virino falis teren. Pro la granda emocio trafis ŝin nervoŝoko kaj ŝi svenis. La forte sanganta Stefano F. — kun tranĉilo en la dorso — sen unu vevorto trankvile atendis la aŭtomobilon ambulancan.

„FLAMANTA AMO"

„Fajroo! Fajroo! Helpuuu! Helpuuu!" — kriadis alarme viro taŭzita, Johano L., kurante al la policejo. Tie li anhele raportis la teruraĵon, kiun la policanoj akceptis iom dube. Tamen pruviĝis, ke la viro diris veron. Jen:

Lia edzino je la kutima tempo ne alvenis hejmen. La malfruiĝo vekis sovaĝan ĵaluzon en Johano L. Por venĝi kontrau ŝi, li eltrovis strangan rimedon. Per porkograso (nur tiu estis ĉemane) li abunde ŝmiris la meblaron kaj ekbruligis la loĝejon. Poste — vidante la flamolangojn — teruriĝinte de la propra faro — li klopodis ilin estingi. Senrezulte.

La polico ne interkonsentis kun la „genia amdeklaro" kaj arestis la „fajran" kavaliron."

Kompilis: Ada Csiszár

HUMURO

Antaŭ juĝisto. — Kial vi volas revoki vian konfeson? En la policejo vi jam pente konfesis vian kulpon.

— Sinjoro juĝisto, mi vin petas, mia advokato sukcesis min konvinki, ke mi estas senkulpa.

Amikinoj. — Belega estas ĉi tiu via nova kostumo.

— Mi ricevis ĝin por mia trideka naskiĝtago.

— Mirindege! Kaj ankoraŭ ĉiam ĝi estas laŭmoda!!!!

Fideleco. Estas noktmeze. Mezaĝa paro revenas el kinejo. Antaŭ la pordego ili longe interparolas. La viro demandas:

— Diru, Eliza, kiam vi fine decidiĝos?

— Karulo, vi scias ja, ke mia plej arda deziro estas fuĝi kun vi — kveras la virino kareseme — sed ankaŭ tion vi scias, ke per tio ni farus tro grandan ĝojon al mia edzo.

Somero. — Mi aŭdis, ke vi estis en Romo. Ĉu vi vidis la papon?

— Ne.

— Malfeliĉulo! Esti en Romo kaj ne vidi la papon estas tia sama, kiel vidi Napolon kaj poste ne morti.

En drink-baro. Dekkelkjara knabo sidiĝis sur la plej multekosta loko de la nokta amuzejo.

— De kiu vi havis tiom da mono, ke vi povis aĉeti tiel multekostan bileton? — demandas viro sidanta apud li.

— Mi ne havis tiom da mono; la bileton aĉetis mia patro.

— Kaj kie nun estas via patro?

— Hejme. Li serĉadas la bileton.

Damaĝo. — Kiu rompis ĉe vi la fenestron?

— Panjo. Sed paĉjo pri tio kulpas: li saltis flanken.

Povas esti. — Paĉjo. — demandas la detektivon lia fileto —, kial la kirurgoj surhavas gumgantojn dum la operacio?

— Por ke ili ne postlasu fingropremajn signojn por daktiloskopio.

Soifo. La poeto vespermanĝis en restoracio kun siaj amikoj. Post la manĝo sekvis trinko de ne tre malmulta vino. Poste la poeto prenis sian monujon, malfermis ĝin kaj longtempe ĝin enrigardis.

— Kion vi rigardas? — lin demandis lia tablonajbaro.

— Tion — respondis la poeto —, ĉu ankoraŭ mi estas soifa.

Internacia famo de hungaraj gramofon-diskoj

La produktado de gramofon-diskoj eksterordinare kreskas tutmonde, tiel ke la muzikamantoj ofte ne scias, kiun el ili elekti por aĉeto. Nu, la industrio de diskoj trovis solvon, kiel doni konsilojn al la muzikemaj interesuloj: ĝi estas la premiado de la diskoj. Ĉi tiu distingado, kompreneble, servas la reklamon, sed en la bona senco de la vorto. La diskofabrikoj nome zorgas pri tio, ke la premiado estu justa kaj ĝusta. Tial por la aljuĝo de la premioj ili organizis internaciajn forumojn el unuarangaj, mondfamaj artistoj kaj scienculoj, fakuloj de la alta muzik-kulturo.

La hungaraj gramofon-diskoj, precipe en la lastaj jaroj, gajnis multajn ĝenerale respektatajn premiojn. Mi mencios nun sole kelkajn el ili: tiajn, kiuj atingis plej altrangajn, plej famajn distingojn. Kelkaj hungaraj diskoj gajnis eĉ plurajn premiojn.

Granda premio de Muzikhistoria Instituto de la Franca Akademio. Ĉi tiun premion gajnis en 1970 hungara disko-serio de la komponaĵoj de *F. Liszt.* La juĝistaro trovis la serion tre valora pro tio, ke ĝi sonigas verkojn ĝis nun apenaŭ aŭ tute nekonatajn en aŭtentika prezentado kun rimarkindaj teknikaj solvoj. — En 1971 ĉi-sama premio estis donita al diskoserio enhavanta la tutan verkaron de *Béla Bartók* (ĝis nun aperis proksimume ĝiaj du trionoj). La motivoj de la aljuĝo estis tiuj samaj, kiuj ĉe la Liszt-diskoj, sed krome oni trovis speciale valoraj la aldonitajn rimarkojn, sciencajn notojn kaj portretojn. — En 1972 ricevis ĉi tiun distingon la hungara disko surhavanta la komponaĵon „Pierrot Lunaire" de *A. Schönberg.* La ĉefa motivo de la aljuĝo estis, ke en ĝi kantis *Erika Sziklai,* kaj prezentis sian tre malfacilan parton tiel modele, ke similan interpreton ne aŭdis eĉ la plej eminentaj fakuloj.

Granda premio de la Akademio Charles Cros. En 1969 ĉi tiun premion ricevis la hungara disko „Psalmo" de *F. Liszt,* baze de la samaj motivoj kiel la antaŭaj: Krome la saman premion ricevis la disko surhavanta la novan hungaran operon „Sanga nupto" de *Sándor Szokolay,* laŭ la teksto de *García Lorca.* En la motivado de la prijuĝo estas menciite, ke eksterordinare grandvalora kultura ago estas fari diskon pri nuntempa plena opero en originala lingvo kun eminentaj gekantistoj kaj sugestia interpretado. (Rimarkinde, ke samkategorian premion gajnis samtempe Wagner-operoj sub gvidado de H. V. Karajan kaj kun kantistoj kiel ekz-e D. Fischer-Dieskau.) — En 1972 la saman premion ricevis la hungara disko kun la „Kristo-oratorio" de *F. Liszt,* kaj krome disko kun pianoverkoj de *Chopin* en la prezentado de *D. Ránki.* Chopin-diskoj estas tre ofte produktataj en ĉiuj mondopartoj, des pli altranga estas tiu distingo de la juna hungara pianisto.

Granda premio de la Germanaj Disko-kritikistoj. En 1969 ĝin ricevis la hungara opero „Sanga Nupto" de *S. Szokolay,* kaj en 1970 la unua parto de la serio „Hungara Popolmuziko". Koncerne ĉi lastan, la juĝistaro emfazis, kiel grandmerite estas doni diskon pri muziko apenaŭ konata eĉ de profesiuloj. Krom la sonanta materialo, grandvalora estas la teksto kun multaj informriĉaj detaloj eĉ por fakuloj, sed en kiu ankaŭ ne-fakuloj povas trovi multajn interesajn kaj al ili kompreneblajn sciindaĵojn. Solvi la taskon, ke fakuloj kaj laikoj same komprenu detalojn science altnivelajn — ĉi tio mem meritas premion.

Premio de Kritikistoj de la Gazeto Diapason. Ĉi tiun nove fonditan premion oni aljuĝis la unuan fojon en 1972. Premiitaj estis tri hungaraj diskoj kun komponaĵoj de hungaraj komponistoj. Ĉi tio montras ne nur tion, ke la hungara diskoindustro atingas la mondnivelon, sed ankau tion, ke la juna generacio de la hungaraj komponistoj jam havas internacian famon kaj estas alte taksataj en la muzikama mondo.

Ekzistas gramofon-diskaj sukcesoj, kiuj valoras tiom, kiel granda internacia premio. Ekzemplo pri tio estas, ke inter la diskoj eldonitaj de UNESKO troviĝas komponaĵoj de tri hungaraj komponistoj: *Szőllősi, Bozay, Durko.* Ankaŭ ĉi tio pruvas, ke la nuntempaj hungaraj komponistoj apartenas al la unua vico de la hodiaŭa muzika vivo.

Dro Lajos Lesznai

MEMORE AL TOMAŜ PUMPR

La granda perdo, kiun la E-a mondo, precipe la ĉeha E-a vivo suferis per la morto de akademiano Tomaŝ Pumpr, estas speciale dolora al mi, lia malnova amiko. Jes, ĉar kvankam ni neniam renkontiĝis persone, nin interligis longa, pli malpli regula kaj pli malpli pasia korespondado. Li estis ideala diskutanto, lertega skermanto, povanta plezuri pri lerta finto de sia kontraŭulo kaj povanta riposti kun lerto plezuriga. Sed la ĉefa afero por li estis la trovo de la vero. Ĉi tio prilumigas lian tutan personecon: li estis altgrade objektiva amanto de korekta ludo, de batalo ĉiam por afero kaj neniam kontraŭ persono. En mia „Vojaĝo inter la tempoj" laŭ lia konsilo mi forstrekis kelkajn frazojn iom tro akrigitajn kontraŭ personoj.

Lia alia karakterizaĵo estis la laboremo kaj la laborofera helpemo. Kiam pretiĝadis mia „Voĵaĝo", li verkis por mia helpo tutan traktaton E-lingvan pri la verbaspektoj en la ĉeĥa lingvo. Sciiĝinte, ke mi klopodas traduki la sumeran-asiran epopeon „Gilgameŝ", nepetite li tradukis ĝin al mi proze el la teksto de ĉeĥaj sumerologoj. Kaj mi ne dubas, ke multaj aliaj estis al li tiel dankdevigitaj. Jen, ekzemple, por Naudzius li klopodis zorgi pri sespieda heksametrovarianto uzebla traduki epopeon de Donelaitis el la litova. (Cetere, li akceptis ankaŭ mian solvon kaj eĉ tradukis tiuforme tutan kanton el la Eneado de Vergilio.)

Mi renkontis lian nomon unuafoje en la Ĉeĥoslovaka Antologio (1935), por kiu li tradukis poemojn el Jiri Volker, Sv. Čeĥ kaj aliaj kun okulfrapa lerto, glato, facilo; en dramfragmento el Zeyer li sciis tra 700 versoj apliki virfinajn blankversojn, neniom perdinte el la natureco de la parolo. Memstare aperis liatraduke unue „Bukedo de naciaj mitoj" de Erben. Sed la granda, surpriza tradukostelo estis „Bapto de caro Vladimiro" de K. H. Borovsky (ĉe Stafeto): satiro tiel viva en E-o, ke la originalo apenaŭ povas esti pli efekta. Jen, la rimitaj kvartrokeoj fluas en ĝi kun la natureco de la anekdotado, kaj la mezaj (leonaj) rimoj ne nur ne estas malhelpoj, sed estas eĉ rimedoj por pliigi la groteskan humurecon.

Lian amon al la muziko montras liaj tradukoj de operarioj en La Nica L. R., kies redakciano li estis kaj de plenaj operoj de Smetana, Dvorĵak, Blodek, elsenditaj de la Verda Stacio de Radio Praha.

Li helpis plurajn tradukantojn interpreti ĉehan poezion helpe de E-o kiel pontlingvo. Kaj estas certe, ke multaj manuskriptoj (nepre savendaj) atestas ankoraŭ lian laboremon.

Kiel lingvisto, li plej intense partoprenis en la redakto kaj traduko de la „Poŝatlaso de la mondo" (tion, tamen, karakterize pri lia modesteco, oni povas nur pene elserĉi el la tre etlitera antaŭparolo). En la „Simpozio pri ata/ita" troviĝas de li 106-paĝa traktato „E-o sen aspektoj?" — eĉ kontraŭopinianto devos estimi en ĝi la feran forton de argumentado kaj la serenecon de la tono. Samvolume legeblas de li „Inter du kruĉoj da biero": bonega humuraĵo pri la kutimlimigita pensado. Jes, ankaŭ la humureco estis unu el liaj flankoj: liaj poemoj en L. M. estis de humura speco.

Ekzistas personoj, kiuj, eĉ se ne renkontataj, estas al ni valoregaj jam per tio, ke ili ekzistas, ofte pensataj memorataj amindaj individuoj, kies bonvola kritiko kaj ĉiama helpopreto estas nepre konfidinda. Tia estis nia Tomaŝ Pumpr, kaj kiam li, laboranta en sia profesio de juristo ankoraŭ en sia 66-a jaro, mortis en Praha la 10-an de septembro, mi kaj certe multaj kun mi sentas, ke per tio ni fariĝis pli malriĉaj, ke la ĉarmo senteble malpliiĝis en la mondo.

K. Kalocsay

Beograd invitas vin al la 58-a Universala Kongreso

okazonta de la 28.7. — 4.8. 1973.

La prezidento de la Socialista Federacia Respubliko Jugoslavio, marŝalo TITO, pozitive respondis al la peto de Jugoslavia Esperanto Ligo kaj akceptis esti alta protektanto de la 58-a Universala Kongreso en Beograd.

Ĝeneralaj informoj:

Konstanta adreso de la Kongreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 3002, Nederlando. Telefono: (010) 36 15 39.

Kotizo: La kongresa kotizo inkluzivas la tutan programon de la Kongreso, escepte de aranĝoj aparte pagendaj. Ĝi devas esti antaŭpagita, kaj ne estas repagebla, eĉ se la aliĝinto ne partoprenos la Kongreson. Tion bonvolu atenti precipe tiuj personoj, kiuj pagas la kotizon por alia persono.

Limdato: Aliĝoj estas precipe akceptataj ĝis la 20-a de junio 1973. Por la limdatoj validas la dato de la pago. Aliĝiloj estas senpage riceveblaj ĉe la konstanta adreso de la Kongreso.

OFICIALA BULTENO 58-A UK BEOGRAD, JUGOSLAVIO

RELIGIECO EN HUNGARLANDO

(Leganto de la Hungara Vivo, Antoni Hała, Pollando, en letero petis informon de la redakcio pri la nuntempa situacio de la religioj en nia lando. Anstataŭ apartaj respondleteroj, ni publikigas pri tio ĉi-sube artikolon de nia redakciano.)

Somere, post la Hungara Esperanta Kultura Festivalo, kun kelkaj partoprenantoj veturante preter la Balatono, inter ravaj montetoj, meze de bele situantaj vilaĝetoj ni havis foje surprizon. Vizitante ĉarmajn, malnovajn preĝejojn, kiujn la paroĥestro volonte montris post la diservo aŭ familia ceremonio, fierante pri ilia artvaloro, montriĝis zorgema fakscia renovigado, malkovrado de artaj detaloj el la pasinto. Apenaŭ ŝajnis kredeble, ke la vilaĝaj eklezioj financis tian multekostan artan entreprenon, kaj je niaj demandoj klariĝis la afero. Ŝtataj instancoj venis helpi, ili farigis la tutan renovigon, same kiel aliloke novajn, modernajn preĝejojn.

En Esztergom, ekspertoj, faklaboristoj laboris ekstere-interne sur la majesta Baziiiko, kaj ni aŭdis, ke la kostoj de la renovigado jam superis 20 milionojn da forintoj, el ŝtata kaso. Granda sumo certe, tamen ne mirinde. Tio, kion ni tiel observis dum niaj ekskursoj, devenis tute nature el la principoj de la ŝtato, rilate al la eklezioj.

La socialisma *Konstitucio* de Hungarujo (el 1949 kaj 1972) konsekvence deklaras la liberecon de la civitanoj, inter aliaj ankaŭ la religian liberecon. Laŭ tio, ĉiu rajtas libere praktiki sian kredon, partopreni en ĉiu ajn religio, kaj ĉi tiuj povas libere organizi siajn ekleziojn, plenumi siajn ceremoniojn kaj religiajn liturgiojn. La ŝtato prezentas al ili ankaŭ la necesajn rimedojn, por igi realaj iliajn rajtojn, t.e. plurfacan, ĉefe financan subtenon por la religiaj organizaĵoj. Ĝi kompletigas la salajron de la pastroj (pere de la episkopoj), prezentas al ili loĝdomon, apogas kaj helpas ilin multrilate.

Proksime al la lago ni renkontis eklezian *feriohejmon* por pastroj (alifoje mi renkontis similan, apartenantan al alia religio, en la montaro Mátra). Plurloke troviĝas socialaj hejmoj por maljunaj, pensiumitaj pastroj (en Jászberény ekz. por iamaj monaĥinoj), kaj tie kuniĝas ŝtata prizorgo kaj laŭreligia vivmaniero. Ankaŭ kvar katolikaj ordenoj funkcias en la lando — inter ili ordeno de instru-monaĥinoj.

El historia vidpunkto havas apartan gravecon, ke la socialisma ŝtato sen ia diskriminacio kunlaboras kun la religioj. Ja, en la antaŭaj reĝimoj ekzistis kaj preme efikis diskriminacio: kelkaj religioj estis favorataj, kaj ekonomie-politike multe helpataj de la registaro. Aliaj religioj estis nur „koncesiitaj", pluraj — kvazaŭ ili estus ne religioj, nur „sektoj" — estis nur „toleritaj" kaj neniel helpataj. Nuntempe ĉi lastaj, eĉ tre malmultnombraj religioj (baptistoj, ktp.) kunigis siajn organizaĵojn en la „Konsilio de Liberaj Eklezioj" kaj bonorde vivas apud la pli grandaj religioj.

La socialisma Konstitucio apartigis ĉiujn religiojn disde la ŝtato, lasante al ili la kutiman eklezian vivon de la kreduloj laŭ la propraj dogmoj. Sekve la religioj ekzistas inter si egalrange kaj egalrajte.

Kongresanoj de la 51-a UK povis observi mem la religian vivon en Budapeŝto. Estis kiuj persone partoprenis diversloke diservojn laŭ sia kredo, kaj multaj vizitis la Esperantajn diservojn, meson.

La Hungara Radio disradiis delokajn raportojn pri tiuj, kaj aparte raportis detale pri la bone sukcesinta Kongreso de la Kristana Esp. Ligo en Debrecen (KELI). En tiu urbo troviĝas ankaŭ nuntempe la landa centro de la kalvinana religio, kaj la kongresanoj ĝuste pri ĉi tiu temo auskultis interesajn prelegojn de hungaraj episkopo kaj pastroj de diversaj kristanaj religioj. Ili informis i.a. ankaŭ pri la religia instruado; la gepatroj mem decidas, kien sendi la infanon. Ili abunde sendas ilin ankaŭ al konfirmacio, kaj. antaŭ tio al la preparaj lecionoj. Pri la fama kalvinana gimnazio prave fieris la hungaraj pastro-gastoj — cetere krom ĝi deko da ekleziaj mezlernejoj (kelkaj por knabinoj) edukas en la servo de la kredantaro.

Kiam ni kun geamikoj serĉis religiajn presaĵojn, en la gazetvendejo troviĝis dekses ekleziaj *gazetoj*, semajngazetoj kaj literaturaj, filozofiaj revuoj. Ekleziaj *libro-eldonejoj* funkcias: kaj religiecaj romanoj, poemlibroj de pastro-poetoj estas aĉeteblaj en librejoj, kaj volumoj strikte ekleziaj aŭ liturgiaj. Inter tiuj mi trovis tre leginda la amplekson raportaĵon pri la II-a Vatikana Sinodo, pri la tieaj agoj de la hungaraj episkopoj. Tiun libron mi aĉetis en centro de la ĉefurbo, kie atenton de multaj altiras la granda vendejo de katolikaj liturgiaĵoj. Kompreneble la religioj havas ankaŭ siajn pastroedukejojn, kaj ĉiujn kun ŝtata subteno.

Mi ne povas lasi sen mencio la pilgrimojn, kies pitoreska bildo, la bunte vestitaj kamparaninoj longe restas en memoro de la spektantoj. En certaj tagoj longvice serpentumas al famekonataj pilgrimlokoj la aŭtobusoj, luitaj de vilaĝaj eklezioj; surŝilde nomoj de diversaj trafik-entreprenoj montras la devenon de la grupo. Aŭtoj intermiksiĝas, alportas vendistojn, bazarajn varojn. Trafikpolicistoj gestadas: malfacila penado estas ĝuste direkti la svarmantan veturilaron. Antaŭ la malfermitaj pordoj de la preĝejo staras granda amaso, kiu jam ne povis enŝoviĝi. Ili atendas sian vicon por ricevi la sakramentojn, dume aŭskultas tra megafonoj la ceremonion. Tage-nokte dejoras la pastraro por kontentigi la aron de pilgrimantoj.

Venas la nokto, kaj la ĉirkaŭantaj kampoj ekfloras de la lumoj de kandeloj kaj torĉoj, reflektoroj reliefigas sur la noktan ĉielfonon la turojn de la preĝejo. En la lando ĉirkaŭe en ĉiuj direktoj regas paco, laboro. Regas la popolo.

E. FENYVESI

„EKZAMENO SEN RISKO"

Ekzamenanto:
Vilmos Benesik

Ĉu Vi konas bone la esperantajn librojn? Se ne, per la novaj enigmoj de *Hungara Vivo* Vi povos intimiĝi kun kelkaj el ili. Ekde nun en ĉiu numero de nia revuo aperos tri demandoj pri iu libro, kiun Vi jam havas aŭ facile povas aĉeti. Por respondi la demandojn Vi devos iomete foliumi la koncernan Iibron. Kompreneble, inter tiuj, kiuj alsendas ĝustan solvon al minimume *du demandoj*, ni lotumos libropremiojn. Ni pensas, ke en tiu ĉi konkurso gajnos ne nur la ricevontoj de la libropremioj, sed ĉiu partoprenanto. En la nuna numero la demandoj koncernas la poemaron de Petőfi: *Libero kaj Amo.*

1. Kalocsay en sia antaŭparolo al la volumo plurfoje citas monografion pri Petőfi, verkitan de vivanta hungara poeto-verkisto. *Kio estas lia nomo?*

2. Ni citas la unuan strofon de Petőfi-poemo, verkita en 1847. *Bonvolu alsendi la lastan strofon de la sama poemo.*

„Fajfegas frida vento
sub peze morna nub',
ĝemeloj de la vintro
atakas: neĝ' kaj pluv'."

3. Jen la finaj versoj de poemo, verkita en 1846. *Bonvolu alsendi la titolon de la poemo.*

„Trovita tie estu mia resto,
se sekvos enteriga granda festo,
kaj oni kun funebra marŝ' muzika,
kun vualitaj flagoj, en unika
komuna tombo donos al la tero
martirojn viajn, sankta
Mondlibero!"

BHG

TELEKOMUNIKADA FABRIKO BELOIANNIS

TELEFONO: 453-300

TELEGRAM-ADRESO: „MIKROFON BUDAPEST"

TELEX: 3823



CA-22

La Telekomunikada Fabriko Beloiannis okupiĝas pri fabrikado de aŭtomataj telefoncentraloj necesaj al telefonaj retoj. Ĝi liveras, muntas tiujn en ĉiu grandeco kaj por ĉiu destino, kaj trandonas ilin al la mendintoj kun ĉiuj akcesoraĵoj en daŭra funkciado. La entrepreno evoluinta el la malgranda uzino, fondita en 1874, fiere konstatas, ke — escepte de etkelkaj — ĉiuj telefoncentraloj uzitaj aŭ uzataj en Hungario — estis pretigitaj en ĝiaj uzinoj.

Dum la ampleksigo de la enlanda telefonreto en signifa kvanto estas funkciigataj ĉiujare instalaĵoj de BHG, inter ili aŭtomataj interurbaj telefoncentraloj. Uzante tiujn jam de jaroj senpere povas ciferdiski unu la alian telefonabonintoj provincaj kaj Budapeŝtaj.

Estas ĝenerale konate, ke la Telekomunikada Fabriko BHG estas simultana kun la evoluo de telefoncentrala tekniko per la enkonduko de la krosbara *(crossbar)* tekniko. En komparo kun la tutmonda fabrikado oni pretigas pli ol la duonon de la telefoncentraloj per krosbar-tekniko, — dume en BHG pli ol 90%-oj estas fabrikataj per krosbar-tekniko. Granda elekteblo de modernaj instalaĵoj estas je dispono de la interesiĝantoj:. El inter la laŭtempaj modernaj instalaĵoj evoluigitaj de la inĝenieroj de BHG estas unuavice menciinda la subcentrala grupo de tipo CA, kies konektomaŝino: la ĝemel-ponta krosbarmaŝino — estas hungara patento. Por fabrikado de centraloj kun malpli multaj linioj evoluigis la inĝenieroj de la uzino la subcentral-grupon de tipo AR, en kiu oni uzis nur relajsojn kiel konektil-elementojn, nome la dratrisortajn relajsojn, ankaŭ konstruitaj de hungaraj ekspertoj kaj protektitaj per patento.

La plej malgrandaj subcentral-grupoj de tipoj CA, respektive RA, havas kapaciton por 6 linioj, la plej grandaj por 2000 linioj. Inter tiuj limoj BHG estas servopreta por liverado de 7 diversaj tipoj.

Estas prilaborita kaj jam pretigita doma centralo CH—100—2000, kiu estiĝis por endoma uzado sen ĉeflinio. Ĝi estas taŭga por kreo de plur-centrala uzina reto kaj konektado de ciferdiskaj aŭ ciferklavaraj aparatoj.

Krom la enkonduko de la krosbartekniko estas signifa evoluiga rezulto de la entrepreno la enhejmigo de la elektrona tekniko.

Pri tio atestas la membroj de la ECR-fabrikaĵgrupoj, kiuj enhavas la elektrone direktitajn centralojn.

Inter la instalaĵoj okupas eminentan lokon la krosbara rura centralo (kampara, vilaĝa centralo), kiun prilaboris la Leningrada esplorinstituto de Sovetia Poŝto, kaj kiun la hungaraj evoluigantoj adaptis por hejmlandaj pretendoj. Ĉi tiu instalaĵ-tipo pretigas por 100—2000-linia reto. La konektil-elementoj de la centralo estas la „S"-tipaj relajsoj kaj la sovet-norma krosbar-koneltil-maŝino. La sistemo estas ampleksigebla per relajsa grada direktado po 100-liniaj paŝoj.

En la kadroj de la teknika kunlaboro inter Sveda IN-Ericsson kaj BMG estas konstruataj la AR-signaj krosbar-sistemaj vilaĝaj kaj urbaj publikaj telefoncentraloj por estigo de grandurbaj retoj kaj aŭtomataj interlokaj centraloj kun interurba ciferdiskado.

La eksportisto de ĉi tiu plej granda telefoncentral-fabriko de Mezeŭropo BMG estas BUDAVOX Külkereskedelmi RT. (BUDAVOX Eksterlandkomerca akcia societo)



LA UNUA ZAMENHOF-LETERO AL HUNGARUJO

Antaŭ dekdu jaroj mi iniciatis la kolektadon de nekonataj Zamenhof-leteroj (v. Heroldon de Esperanto, 1-a de majo 1959). Mia intenco estis — post kolektivaj esplorlaboroj — aperigi la leterojn en volumo.

Post mia alvoko multaj leteroj iĝis konataj, kiuj aperis nek en la *Originala Verkaro* redaktita de Dietterle, nek en *Leteroj de Zamenhof*, redaktita de Waringhien.

Kiam nun aktualiĝis ilia aperigo ankaŭ en volumo, mi kontribuas per interesa forgesita letero, kiu estas valora ne nur el lingva kaj stila vidpunktoj, sed ankaŭ el enhava. Mi nur supozis la ekziston de tiu ĉi letero, fine post zorgaj kaj longtempaj esplorlaboroj mi trovis ĝin en hungarlingva tagĵurnalo Esperante. Zamenhof direktis la leteron al hungara instruisto kaj verkisto, d-ro Ábel *Barabás*, redaktoro de la unua Esperanto-lernolibro por hungaroj. Cetere la lernolibron iniciatis hungara universitata profesoro d-ro Gábor *Bálint*, kiu estis la unua hungara esperantisto, fama orientalist-lingvisto kaj vojaĝanto, kiu kuraĝe batalis por Esperanto kontraŭ la falsaj kritikoj kaj mokoj de akademiaj scienculoj kaj lingvistoj. Prof. Bálint skribis tre valoran antaŭparolon al la lernolibro de sia disĉiplo.

La leteron aperigis iama ĵurnalo *Ellenzék* (Opozicio) la 16-an de aprilo 1898 en urbo Kolozsvár (nun Cluj en Rumanio). Rimarkinde stranga estas, ke la ĵurnalo citas la tutan leteron Esperante sen traduko hungaren. Oni povas legi nur la enkondukan frazon hungare, kies traduko estas:

LETERO DE D-RO ZAMENHOF

D-ro Ludoviko Zamenhof, la kreinto de mondlingvo Esperanto sendis la sekvan leteron el Ruslando por Ábel Barabás, kunlaboranto de nia ĵurnalo kaj aŭtoro de libro: Esperanto-mondlingvo.

Al sinjoro Ábel Barabás
ĵurnalisto
Kolozsvár
Redakcio de Ellenzék

Varsovio, 25. Marto 1898.

KARA SINJORO!

Mi ricevis vian leteron kaj ankaŭ la du ekzemplerojn de via hungara lernolibro de Esperanto, por kiuj mi kore dankas. Vian leteron mi legis kun granda plezuro kaj vian bonegan libron mi salutas kun ĝojo, kiel komencon de nia afero en via lando. Estas al mi tre agrabla vidi, ke nia afero trovis en Via estimata persono tiel varman kaj energian laboranton; mi esperas, ke la bela Hungarujo baldaŭ okupos unu el la plej honoraj lokoj en la historio de nia afero kaj ĝi baldaŭ povos servi kiel belega kaj imitinda ekzemplo por la aliaj landoj. Al viaj laboroj mi deziras la plej bonajn sukcesojn. La aranĝo de via libro estas bonega; la libro enhavas ĉion, kio estas necesa por la fundamenta ellerno de nia lingvo.

Mi petas Vin kore, volu skribadi de tempo al tempo al mi (kaj ankaŭ al la redakcioj de niaj gazetoj „Lingvo Internacia", „L' Esperantiste") pri la irado de nia afero en via lando. Volu peni, ke la „Adresaro de Esperantistoj" baldaŭ enhavu multajn nomojn el via lando..

Kun plej kora saluto

L. Zamenhof

Samtempe mi aldonas la tekston de alia Zamenhofaĵo. Ĝi estas skribita sur rusa oficiala poŝtkarto kaj havas E-surskribon apud la franca kaj rusa surskribaĵoj. (Pri similaj oficialaj kartoj mi scias nur el la soveta tempo. Kiu scias pri similaj oficialaj postkartoj el tiu ĉi frua tempo? Kiam komencis uzi ilin la rusa kaj poste la soveta poŝtadministracioj? (Zamenhof adresis la poŝtkarton al s-ro Béla Dávid, universitata oficisto en Kolozsvár. Jen la sendita karto de Zamenhof:

KARA SINJORO!

Vian karton mi danke ricevis. Al la nova fondita grupo mi sendas mian saluton via.

L. Z.

Ernő Farkas

LILLI PROMET:

Kuŝanta tigro

El la estona lingvo tradukis Alma Lekko. Eldonejo „Eesti Raamat" Tallinn 1971. Formato 13x17,76 paĝoj, 5 grafikaĵoj de Ewald Okas. Prezo 33 kopekoj.

La kartonbindita volumeto enhavas 14 mallongajn rakontetojn, skizojn pri akraokule observitaj momentoj de la ĉiutaga vivo. Ili ne estas simplaj priskriboj, sed senescepte interesokaptaj, emocivokantaj kaj variaj beletraj verkaĵoj kun surprizaj finaloj.

„Kuŝanta tigro" estas bildo de estona grafikisto Eduard Viiralt, kiu longan tempon vivis kaj laboris en Parizo. Dum la dialogo inter la grafikartisto kaj lia studobjekto, la tigro ŝajne konsentas, ke ĉirkaŭ ĝi sur la bildo estu betuloj, kiajn ĝi neniam vidis en sia vivo, tamen „oni ne tre kredu tigron, ĉar fakte ĝi sopiris eĉ pli forte je siaj ludoplacoj, siaj embuskejoj kaj trinklokoj. Ĉar sopiroj neniam povas finiĝi, se ili estas sopiroj al sia hejmlando". Ĉirkaŭ tiu titoldona artpeco ariĝas la ceteraj rakontetoj, kies plimulto resonigas sur pesimismaj kordoj amarajn sentojn. Larmojn provokas la sorto de patro, kiu post malvarmumo perdas sian kantvoĉon kaj senespere strebas akiri por sia familio vivtenan profesion per imitado de bojado (Olivier). Rezigne konstatas olda gardisto de zooparko, ke la maljuna aglo kvankam ĝi estas jam liberigita de la ĉenoj, tamen „ne forflugas, ĉar ĝi jam alkutimiĝis". Kolizio en familio inter du mondperceptoj kaŭzas rifuĝon en „Forveturo de patrino". La temoj, simile al la menciitaj, estas prenitaj el la realo.

Kapablo precize kapti la realon kaj subtile resumi la finan konsekvencon estas nekontesteblaj valoroj de la prezentita volumo el plumo de longe jam profesia estona verkistino.

La redaktadon faris Henrik Seppik, elstarulo de la estona skolo esperantista kaj tio garantias, ke la traduko estas senriproĉa kaj vekas estetikan plezuron en la legantoj.

Eta rimarko: „hilzo" (p. 35) kaj „kamemoroj" (40) ne troviĝas en PIV kaj malhavas la klarigajn piednotojn.

my

Ni atendas vin kun granda sortimento de
artobjektoj, porcelan- kaj vitrovaroj,
ligno- kaj bronzo-skulptajoj,
antikvaj argent- kaj or-medaloj,
oraj kaj diamantaj juveloj,
en niaj vendejoj:

Budapeŝto, I. Hess András tér 3.
VI. Népköztársaság ú 27.
Hotelo Gellért
Hotelo Intercontinental

Antikvaj mebloj:
Konsumex V. Budapeŝto V.
Tanács körút 26.

Markhavaj pentrajoj:
Artex V. Budapeŝto V.
Münnich Ferenc u. 31.

Tiuj varoj estas aĉeteblaj por konvertebla valuto kaj estas eksporteblaj el la lando sendogane.

Konsumturist



Karaj Abonantoj

En nia lasta numero ni jam anoncis, ke Hungara Vivo ekde januaro 1973 aperos anstataŭ la ĝisnunaj tri monatoj dumonate. Tio estis de jaroj dorlota planosonĝo de la redaktoroj, kunlaborantoj de nia revuo, kaj same de niaj en- kaj eksterlandaj amikoj. De niaj karaj legantoj — precipe en la lastaj du-tri jaroj — ni ricevis ĉiam pli multajn leterojn, — kelkajn el ili ni ankaŭ presigis —, kies skribantoj pro la enhavaj kaj formaj virtoj de la revuo urĝis la monatan, sed laŭeble dumonatan eldonon de Hungara Vivo.

La novaj, pli modernaj metodoj, aplikitaj en redaktado de nia revuo (ekz. komuniko de anoncoj, simile al la nacilingvaj gazetoj) rezultigis, ke Hungara Vivo jam en tiu ĉi jaro fariĝis sendeficita, kaj tio ebligis, ke ni pagu la kutiman honorarion por niaj aŭtoroj, provizore nur por la enlandaj. La nun sekvonta granda paŝo de tiu ĉi evoluo estas la transiro al dumonata aperigo. Ni esperas, ke niaj abonantoj ankaŭ plue restos niaj fidelaj legantoj, kaj rekomendante nian revuon al siaj gekonatuloj, ili helpos nin ankaŭ en tio: kolekti eĉ pli da amikoj, abonantoj por Hungara Vivo.

Pro teknikaj kaŭzoj, la revuo povas aperi dumonate nur ekde januaro 1974. Ni petas vian pacienCon ĝis tiam.

Redakta Komitato

PÉCS INVITAS ESPERANTISTOJN

La Sudhungarlanda montaro Mecsek (Meĉek) ĉiujare allogas esperantistojn kun riĉa programo al du internaciaj renkontiĝoj. En la agrabla kampadejo de ĉarma ripozloko ABALIGET por la 6a IREN inter la 18—27-a de julio 1973, antaŭ la Universala Kongreso, estas invitataj esperantistoj naturamikoj. La moderna junpionira rendaro en ŠIKONDA gastigos esperantistajn infanojn (10—14 jarajn) en la kadro de la 6a PIONIRA INTERNACIA TENDUMADO (PIT) de la 10-a ĝis la 19a de julio. Pri ambaŭ aranĝoj detale informas Organiza Komitato H—7601 PÉCS Pf. 2. Hungarujo.

FORUMO

„Alparolante al la rubriko — Forumo — en Hungara Vivo, mi dezirus peti, ke la literoj estu pli grandaj simile al la literoj de „Coffea Arabica" sur la 28-a paĝo de la 2-a numero en 1972. — La alia peto: en ĉiuj revuoj estu du noveloj, unu de malnova hungara noveloaŭtoro, la alia de nova aŭtoro.

Kun amikaj salutoj via *Nádor Jenő, Tiszapüspöki*"

Viaj du deziroj kontraŭas unu la alian. Publikigi du novelojn postulas pli da spaco, uzo de pli grandaj literoj malpliigas la spacon disponeblan. Bedaŭrinde. *Redakcio.*

LETERKESTO

Al k-do *Teodoro Kulagin,* Moskvo, Sovetunio: ni ricevis dankante vian detalan raporton pri la tutsoveta Esperanto-movado. — Bedaŭrinde ni ne povis partopreni la programojn de la *Moskva Internacia Esperanto-Klubo* (MIEK), kie vi regule ĉiu-semajne kunvenas. — Nun ni publikigas vian adreson por la venontaj vizitantoj en la ĉefurbo de Sovetunio: Centralnij Dom Kulturi Medicinskih Rabotnikov, MOSKVO, ul. Gercena 19. (Trafiko: trolebuso — 5, 8, 15, 31; aŭtobuso — 6, 39, 107; subtera fervojo — haltejo Arbatskaja.)

Poŝtadreso: 101 000, Moskvo, Centr. ab (jaŝĉ. 842, Klub Esperanto.

— Ni deziras, ke ĉiu dimanĉe, kiam vi renkontiĝas kun en- kaj ekterlandanoj, fortigu plu tiel sukcesplene la internaciismon, la amikecon por la antaŭpaŝo de nia reciproka ekkono!

Al *Jozefo Velebit,* Vrbovec, Jugoslavio: ni kun ĝojo ricevis vian varmvoĉan leteron kaj artikoleton koncerne al la naskiĝdatreveno de nia estimata samideanino Hilda Dresen, kiun ankaŭ ni salutegas, pardonpetante, ke la menciitan artikolon ni ne povas publikigi pro la malfruo de la alveno.

Al *Koresponda Servo de TEJO* (Janusz Grzegorz Wolak, Sopot, Pollando): mi deziras sukcesplenan agadon rilate kun via fruktodona koresponda servo. La interesatoj turniĝu rekte al *Jadwiga Greger,* Sopot, Pollando, str. Kujawska 24., por ricevi ŝanĝadreson!

Kaj fine ni varmkore salutas inter niaj korespondantoj la subajn: *Viktor Milicin* el Krivoj Rog, Ukraino; *Egey Jenő* el Tirgu Mures, Rumanio; *Harold Richards* el Longueville, Aŭstralio; *Kozi Sato* el Nagasaki, Japanio; *Hukaya Sitosi* japana studento de Eötvös Loránd Scienca Universitato, Budapest.

Ni informas la samideanojn *Hugo Löfgren* el Svedlando kaj *B. D. Kaneen* el Kanado, ke la mankantajn numerojn de nia revuo ni sendos al vi, dezirante pluan agrablan tempopasigon kaj amuziĝon!

KORESPONDI DEZIRAS

HUNGARIO: Gulyás József, Szentsimon, Béke u. 69. — *22-jara, kolektas ekterlandajn prešajojn ajn-specajn. Korespondus kun similaj seriozaj junuloj.*

Miskolc, Csabai kapu 22. *Suzana Feledy.* — Mi estas 18 jara, en ĉi tiu jaro mi finas l'artan mezlernejon. Mi scias modere paroli pole, germane, ruse. Mi ŝatas la belartojn, muzikon, literaturon, filmojn, filozofion, antikvaĵon.

Kolonics Károly, Székesfehérvár, Népköztársaság útja 27. I. em. — *kor. kun knaboj, kolektante bk., pm.*

Verbulecz Sándor, Mohács. Kossuth Lajos u. 22. — *Geedzoparo, kol. bk. — Volus fari reciprokajn ekskursojn.*

POLLANDO: *200 gejunuloj en aĝo 16—30 jaroj dez. kor. kun gejunuloj el la tuta mondo pri ĉiuj temoj, interalie pri reciprokaj vizitoj.* — Junulara Esperanto-Rondo, Wroclaw-17, str. Dubois 3. — (Edward Wojtakowski)

Koresponda Servo de TEJO: anoncas sian ŝanĝadreson. Gvidanto: Jadwiga Greger, Sopot, str. Kujawska 24. *Oni jam povas sendi la adresojn de esp.-istoj kiuj volas kor. — Krom la nomo k adreso oni sciigu ankaŭ la interesiĝon k aĝon!*

KS ankaŭ akceptas adresojn de E-kluboj k Rondoj, kiuj volus komune kor. k kunlabori.

ĴERCU LA DEVIZON!

Pluraj vicoj de nia enigmo koncernas la ĉeftemon de ĉi numero: la vivon kaj vivoverkon de nia senmorta poeto. Krome ni kaŝis en la enigmon unu citaĵon el poemo de Petőfi; tiuj du versoj validis por la poeto kiel devizo.

La literojn, kiuj staras en la kvadratoj havantaj vicmontran numeralon en la dekstra malsupra angulo, skribu en la konvenan kvadraton de la du vicoj troviĝantaj sub la enigmo. Kunlegante vi ricevos la devizon. Ensendi sufiĉas nur tiun, ĝis la 20-a de aprilo en 1973.



Horizontale: 1. KOMIKA EPOPEO DE PETŐFI, PARODIO DE SOLENISMO KAJ BOMBASTISMO DE LA TIUTEMPAJ ROMANTIKAJ EPOPEOJ KAJ DE LA STILO DE LA ARISTOKRATAJ LITERATOROJ., 13. Eta floro, 14. Ŝtatan' de Mezeŭropa lando, 15. Interjekcio por konsento, 17. Manĝebla radiko de diskoreoj, 18. NOMO DE EDZINO DE PETŐFI, LA POETO EN ŜI TROVIS SIAN GRANDAN DUMVIVAN AMON., 19. Ne — angle, 20. Malofta gaso, uzata por reklama lumigado, 21. TO, 22. Tantalo (kemia signo), 23. Reen: mallongigo de politika partio en GFR, 24. EB, 25. Miksita haro!, 27. LA PLEJ FAMA HUNGARA ROMANVERKISTO, AMIKO DE PETŐFI, UNU EL MEMBROJ DE GRUPO NOMATA SUB 16. VERTIKALA, 29. Mallongigo uzata de diplomitoj, 30. Putin' en la antikva greka imperio, 31. Estige, 32. EO, 33. AE, 34. Komenco de enketo! 36. ZMT, 37. Sendistinga, stulta admiro kaj imito de laŭmodaj aferoj, 40. Multe diskutata finaĵo! 42. Identaj vokaloj, 43. PETŐFI ESTIS BATALANTO NE NUR DE LA LIBERO DE LA HUNGARA NACIO, SED ANKAŬ TIU DE . . . , 46. Fosforo kaj fluoro 48. Fil'de filo, 49. Estante en vivperiodo inter puberiĝo kaj adoltiĝo. 51. Ŝtoneca tavol'de tero, restaĵo de vulkanaj erupcioj, 53. Plenum' de ordono, 54. KV, 55. Sufikso esprimanta ĝeneralan ideon de naskiteco, 56. Literatura verko, 58. En la lingvo de iu sovetrespubliko, 60. Flua industria krudmaterial', 61. Esprimis surprizon, 63. Senkolora, malbrile blanka, 65. Numeralo, 66. POLDEVENA HEROO DE LA HUNGARA LIBERECBATALO, KAJ TIU DE PLURAJ NACIOJ, GENERALO; PETŐFI ESTIS LIA ADJUTANTO., 67. Finaĵo de pasinteco, 69. Vanado kaj Argono, 70. Inklino por pia vivo, 72. Identaj konsonantoj, 73. Apartenanta al Eŭropa nacio, 75. La nekulturita ebenaĵ' (Artikolo kaj radiko), 76. Sufikso montranta la kolektivecon, (kun substantiva finaĵo), 78. Virina nomo, 79. Kureganta akvofluo, rapida monta rivero, 80. UNU EL LA REVOLUCIAJ POEMOJ DE PETŐFI.

Vertikale: 2. Certan parton de matematiko (aplikantan literajn simbolojn), 3. Pagilo, 4. POETO-AMIKO DE PETŐFI (JÁNOS, 1817—1882), 5. Unu el la du legendaj fondintoj de Romo, 6. TTO, 7. Esperanto Oficejo, 8. Oksigeno, Fosforo kaj Uranio, 9. Mezurunu' de elektromova forto aŭ tensio, 10. Ne niaj kaj ne viaj, 11. Argono kaj Jodo, 12. Polica soldato, 13. POEMO DE PETŐFI, UNU EL LA PERLOJ DE LIA POEZIO, PLEJ ŜATATA DE LA LEGANTOJ, 16. GRUPO DE JUNAJ VERKISTOJ, POETOJ,; PETŐFI ESTIS ILIA GVIDANTO, 18. NAIVA EPOPEO, FABELPOEMO DE PETŐFI, APERIS ESPERANTLIGVE JAM EN 1922., 21. Viva aŭ senviva estaĵo, konsiderata kaj adorata de primitivuloj kiel praulo kaj protektanto, 23. Dekret' de rusa caro. 25. Prefikso esprimanta ripeton, 26. Miksita KAJ!, 28. ÓF, 30. POETO, LA PLEJ GRANDA GERMANA LIRIKISTO, (1797—1856); PETŐFI ŜATIS LIAN POEZION KAJ TRADUKIS DE LI. (En la lasta kvadrato staras komenclitero de baptonomo), 33. Kontrakt' antaŭpaginte certigi al si ion, ekz. gazeton, 35. UNU EL LA PLI FRUAJ MUZOJ DE LA POETO (CIPRESFRONDOJ), 38. Mezurunu' de elektra rezistanco, 39. Social-Demokrata Partio, 40. Komenco de 33. vertikala, 41. Reen: konforma al la realo, 44. La plej perfekta, 45. Finaĵo de la estonta tempo, 47. Du infinitivoj, koncernantaj agrokulturon, 50. Mezurunu' de distanco, 52. Ag' malebligi eniron aŭ eliron, 53. Oksigeno, Kalio kaj Fosforo, 57. Reen: tabelvorto, 59. Natrio, 62. Rondforma vaz', por enteni fluaĵon, 64. Em' por kisadi, 68. Liberigi iun de danĝero, 70. Duope, 71. Vulkano en Sicilio (ne esperantigita formo), 74. Ne plu teni, ne plu konservi (radiko), 75.Restad' daŭre en certa loko, 77. Siberia (ne esperantigita formo. 79. TU.

FERI

La ĝusta solvo de nia enigmo aperinta en HV 1972/3 estas: „SE VI KAPABLAS SOLE KANTI PRI L'PROPRAJ ĜOJO KAJ DOLOR' JA VIN LA MONDO NE BEZONAS, LA SANKTAN LIGNON METU FOR!"

Libropremion gajnis: Inĝ. Aleŝ Bednarik, Svatoplukova c/b Senec, el *ČSSR;* Gerard van der Horst, Poŝtfako 8502, Hago — 2078, *el NEDERLANDO;* Esperanto — Klubo, pk. 11. Barnaul — 99 *el SOVETUNIO;* kaj Eszter Szabó, Szeghalom, Petőfi u. 32 *el HUNGARIO.*

Ĝustan solvon ensendis ankorau (ĝis la 30-a de Oktobro) *El BRITIO:* F-ino N. Hanson; *el BULGARIO:* Atanas Gaev; *el ČSSR:* Bárta Frantiŝek, Zdenek Hostomsky, Miroslav Hromas, Paulo Kotmarik kaj Adolf Stanura; *el FRANCIO:* A. Bongars; *el GDR:* Rainer Fischer, Jürgen Hamann, Frohmut Kaller, Klaus Klimt, Linde Knöschke, Ilse Neumann, Gerda Raabe, Karl Raabe, D-ro Karl Schulze kaj Willi Semmler; *el GRF:* D-ro J. Kondor kaj gesinjoroj Waldowski; *el HUNGARIO:* Imre Balogh, Ferencné Bán, Erika Bardocz, Ferenc Bartók, József Bíró, Lenke Bíró, István Bodnár, Lászlóné Bognár, D-ro István Csató, Róza Halász, D-ro József Homoródy, Béla Hubay, Károly Juhász, Tivadar Kerasztthegyi, Éva Kiss, József Kiss, Piroska Kovács, Gizella Kőszegfalvi, Lenke Kun, Károly Magyari, János Mészáros, Imre Nagy, Lajos Niederfriniger, Ilona Osgyán, Sándor Péter, János Podani, *el POLLANDO:* Jerzy Banacki, Maria Grochowska, Anoni Madej, Urszula Zabek kaj Esperanto-Rondo de Kulturdomo en Mystowice; *el SOVETUNIO:* Vikoro Aroloviĉ, Tatjana Baĉina, Rein Kiviaru kaj N.A. Rysowec; *el SVEDIO:* Tomas Jansson.

POR PURA AERO

Por esti sanaj, ni bezonas — inter aliaj — puran, freŝan aeron.

La plej danĝera malpuriga kemiaĵo en nia atmosfero estas nuntempe la *sulfura dioksido.* De kie ĝi venas? Precipe el la bruligata bruna karbo. Niaj brunaj karboj entenas averaĝe 3 procentojn de sulfuro kaj la sulfur-enhavo de la hejtmaterialo aperadas en la fumgaso kiel sulfura dioksido.

Tiu ĉi venena gaso formas kun akvo *sulfitan acidon,* kiu mem estas korodema, kaj en la aero malrapide oksidiĝas je *sulfura trioksido;* ĉi tiu kun akvo produktas en la aero la bone konatan *sulfatan* acidon. Oni ne miru do, se la pluv-akvo montriĝas acida. Temas ja pri ne malmulte da acidoj sulfita kaj sulfata.

Estas eviteble, ke la fumgasoj venenu la aeron: ekzistas aparatoj, per kiuj oni povas el ili ekstrakti la sulfur-enhavon, kaj el ĉi tiu sulfur-trezoro produkti sulfatan acidon. El teknologia vidpunkto la afero estas solvita perfekte.

Tamen, bedaŭrinde, la sensulfurigo de la fum-gasoj kostas multe da mono, tiel ke ĝi estas realigebla kaj ekonomia nur en grandaj kvantoj, ĉe grandaj industriaj unuoj aŭ elektraj centraloj. Sed apliki la aparatojn ĉe la forno de ĉiu pli malpli granda loĝejo estus multekostega.

La problemo de la loĝeja hejto estas solvebla per la uzo de aliaj brulmaterialoj. Tia estas ekzemple la krud-oleo: ĝi enhavas multe malpli da sulfuro ol la bruna karbo kaj estas uzebla pli ekonomie. Pli ol ses milionojn da tunoj oni prilaboras jam jare el tiu moderna brulmaterialo. Ankoraŭ pli bona estas la ter-gaso, ĉar ĝi estas tute sensulfura. Kaj, ankaŭ la krud-oleon oni povas sensulfurigi per distilado. Jen do la solvo, al kiu pli kaj pli tendencas kaj estas kondukata nia tekniko de hejtado: uzi nur sensulfurigitajn distilaĵojn de krud-oleo kaj ter-gason. Ju pli ĉi tiuj anstataŭigas la brunan karbon, des pli pura estos nia atmosfero.

Ĉu vere ĝi estos pura? Nu, ni devas pripensi, ke la protektado de la biosfero estas ne nur loka, sed vere internacia problemo. La moviĝanta akvo kaj moviĝanta aero ne konas landlimojn. Najbarlanda aer-malpurigado minacas ankaŭ la sanon de loĝantoj de l' lando apuda. Estas pruvite, ke oni povas trovi sulfatan acidon pli ol kvincent kilometrojn malproksime de la origina loko malpuriga. Nur internaciaj normoj kaj kontraktoj povas solvi efike la problemon de la aer-malpurigado.

La homaro kaj ĝia ĉirkaŭaĵo dependas unu de la alia. La homoj sopiras kaj bezonas la netuŝitan naturon — puran akvon kaj puran aeron —, sed aliflanke ili — por sia vivteno — bezonas ankaŭ fabrikojn por la produktado de la necesa energio kaj bezonataj varoj. Ĉi tiun kontraŭdiron oni povas solvi, se oni zorge atentas pri la tuto de la homara vivo kaj homara produktado. Nia industria kaj alia produktado devas esti tia, ke ĉe la fino de la produktoprocezo ĉiuj kromproduktaĵoj kaj helpmaterialoj, do ankaŭ la uzita akvo kaj aero — kaj ĉiuj defalaĵoj — malutilu nek al la naturo, nek al la homoj. Per diversaj rimedoj ili devas esti transformitaj en tian staton, en kiu ili ne havas efikon damaĝeman. Ni, homoj de la nuntempo, estas respondaj pri la sano de la nunaj homoj kaj de la sekvantaj generacioj.

Dro Árpád MÁTHÉ

HUNGARA VIVO

Kvaronjara revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Budapest VIII., Kenyérmező utca 6.

XIII-a jaro, 1973. 1-a numero

Ĉefredaktoro: *Mihály Gergely*

Responda redaktoro: *d-ro Jozefo Mátéffy*

Lingva revizio: *K. Kalocsay*

Arta redaktoro: *Jozefo Szekeres*

Redaktoraro:
d-ro Pál Avar, d-ro István Bácskai, Szilárd Bálint, Vilmos Benczik, Ada Csíszár, Ervin Fenyvesi, Zsolt Gyarmathy, D-ro Lajos Lesznai, Alfonso Pechan, Aurél Ponori Thewrewk, Mária Szabó, d-ro István Szerdahelyi, Tibor Újlaky-Nagy, Gábor Vigh

Ĉefkunlaborantoj:
D-ro Géza Bárczi, Paŭlo Balkányi, Károly Jobbágy, Mór Korach, Ludoviko Kökény, Sándor Szathmári, Lajos Tárkony

La redakta komitato la unuan ĵaŭdon de ĉiu monato posttagmeze je la tria ĝis la kvina horo havas akceptotagon. (Bp. VIII., Kenyérmező utca 6.)

Eldonas: „Népszava" Gazeteldona Entrepreno, Budapest, VII., Rákóczi út 54.

Telefono: 224-819

Responda eldonisto: Márton Gábor direktoro

Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K. H. I., Budapest, V., József nádor tér 1.) senpere, aŭ per poŝtmandato.

La abono estas por jaro Ft 32,— al eksterlando krome Ft 6,40 por afranko.

73. 3. 3196 Békés megyei Nyomdaipari Vállalat, Gyula
Indexszám: 25.377

Vintre vigligas,

somere freŝigas

la originala Citral-trio.

EN PRAKTIKA HIGIENA PAKAJO
ĜI ESTAS RICEVEBLA KUN
GUSTOJ GRAPFRUKTO—
ORANĜO—CITRONO EN LA
MANGAĴVENDEJOJ
LA MERKATON METAS

DÉLKER

bion 78

MEDICOR BUDAPEST

MINIATURA JONIZATORO

Bona farto dum stirado — MEDICOR JONIZATORO

Stirada sekureco — prevento de akcidento — MEDICOR JONIZATORO

Plej favora mikroklimato en la aŭtomobilo — MEDICOR JONIZATORO

Ricevebla en distingitaj vendejoj de KERAVILL

Pakaĵekspeda servo al provinco





UZINOJ MEDICOR BUDAPEŜTO